HUNGARA VIVO

4
1983
13,– Ft

GUSTO

ELEGANTECO

KOMFORTO

Produktas **BUBIV**

Budapesti Bútoripari Vállalat

Budapest IV., Lorántffy u. 15 b.

bubiv

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII.Kenyérmező u.6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIIIa jaro, 1983 n-ro 4
(110)

ENHAVO

Intervjuo kun Sándor Gáspár (*András Sugár)* 122
Mihalkov, G.: 75 jaroj de UEA 124
Hubai, M.: En la Nacia Parko Bükk 125
Belaĵoj de la Kongresurbo 128
Gy. Horváth, J.: Departemento Győr-Sopron 132
Hungaroj por la paco 135
Rátkai, A.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 10. 136
Poemoj de Sándor Petőfi (V.*Benczik,* M.*Fejes,* I.*Szabó*) 138
Panoramo 140
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 143
D-ro László, F.: Sukcesa esplorado pri akvo (E.*Fenyvesi*) 144
Fenyvesi, E.: Tra muzeoj de Budapeŝto 146
Originala poezio (Aldo *de' Giorgi,* John I. *Francis,* Imre *Szabó,* Ludmila *Jevsejeva,* Julius *Balbin,* S. *Elgo*) 149
Szabó, I.–*Zsoldos,* L.: Budapeŝto vin brakumas! 150
Szabó, I.–*Zsoldos,* L.: Ĝis revido... 151
Sugár, A.: Pri la lingvaj imperiismo kaj malplivaloreco 152
Nemere, I.: La surdmutulo 153
Golden, B.: Lingva Laboratorio 154
Fenyvesi, E.: Fakterminoj 155
Gaja paĝo (*E.F.*) 156
Major, J.: Geotermika energio en Nov-Zelando 157
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 159
Leterkesto, Korespondi deziras 160

Sur la frontpaĝo: La Ponto Elizabeta en Budapeŝto (Foto de Z. *Fejér*)

Bonvenon en Budapeŝto...

al ĉiuj kongresanoj de la 68-a UK – tiu bondeziro laŭ statistiko farita meze de junio nun direktiĝas al minimume 4500 personoj, kaj tiu cifero estas „preskaŭ-rekordo" en nia kongresa historio.

Niaj abonantoj-nekongresanoj espereble pardonos la Redakcion pro la fakto, ke tiu ĉi numero estas kunmetita kun aparta atento al la Budapeŝta UK.

Sur la sekvaj du paĝoj oni povas legi intervjuon kun la Alta Protektanto de la UK, Sándor *Gáspár,* kiu jam de jardekoj estas dediĉita subtenanto de Esperanto. La 75-jariĝon de UEA primemoras artikolo de Georgi *Mihalkov.* Konatiĝu kun Hungario! – invitas artikoloj pri la *Nacia Parko Bükk,* la *Departemento Győr-Sopron,* pri la *Budapeŝtaj muzeoj* aŭ la bildraportaĵo *Belaĵoj de la Kongresurbo.*

Poeziamantoj verŝajne volonte legos apud originalaj poemoj ankaŭ novajn tradukojn de Petőfi-poemoj, tiom pli, ke plurajn el ili oni povos ankaŭ aŭdi en la recitalo de Gabi *Jobba,* la 4-a de aŭgusto, je la 16-a horo.

Legeblas krome informa artikolo pri la hungara pacmovado, sprita krokizo de András *Sugár* pri lingva imperiismo, kaj ni publikigas du originalajn Esperantajn kantojn, kiuj estis kreitaj por la 68-a UK. Krom la kutimajn rubrikojn oni trovas noveleton de István *Nemere,* kies librojn indas serĉi en la kongresa libroservo, kaj artikolon de Bernard *Golden* pri la lingvaj pekoj de nia revuo.

Kiam tiu ĉi numero forlasos la presejon, en Budapeŝto komenciĝos grandega kunveno de la Esperanto-movado kun renkontiĝo de ĉirkaŭ kvin mil uzantoj de la Internacia Lingvo. Ĉiuj ĉeestantoj ĉerpu spiritan forton el tiu renkontiĝo en la gastama hungara ĉefurbo – kaj neĉeestantaj abonantoj de HV atendu nian detalan raporton en la sekva numero, aperonta en oktobro!

„Ju pli multaj rekonos ĝian neceson, ĝi disvastiĝos des pli rapide"

Intervjuo kun Sándor Gáspár

La ĝenerala sekretario de la hungaraj sindikatoj Sándor Gáspár plenumas ekde kelkaj jaroj ankaŭ la oficon de prezidanto en la Monda Federacio de Sindikatoj, kaj li entreprenas rekonitan gvidrolon ankaŭ en la fruktodone evoluanta kunlaboro inter la sindikatoj en Eŭropo. En Hungario, kie Esperanto ligiĝas de multaj jardekoj al la laboristaj organizaĵoj, kaj ĝi fariĝis konata jam komence de nia jarcento kiel unu el la rimedoj de laborista internaciismo, tute evidentas, ke la sindikata movado subtenas la Esperanto-movadon. Estas same evidente, ke la Alta Protektanto de la ĉijara Universala Kongreso de Esperanto fariĝis Sándor Gáspár, kiu (estante vicprezidanto de la Prezidia Konsilio de Hungara Popolrespubliko – nia ŝtatestra organo – kaj membro de la Politika Buroo de Hungara Socialisma Laborista Partio) povas reprezenti nian landon, gastiganton de la ĉijara kongreso, kiel Alta Protektanto kun enlanda kaj internacia prestiĝo.

Li volonte plenumis la peton akcepti nian kunlaboranton antaŭ la kongreso – post vico de gravaj eksterlandaj traktadoj – kaj paroli neformale pri la Internacia Lingvo, pri la nuna kaj estonta tempoj de Esperanto.



«Estas dolore senti la mankon de ĝenerale internacia, peranta lingvo»

– En multaj internaciaj traktadoj, renkontiĝoj ekregas min la dolora sento, ke la manko de ĝenerale internacia, peranta lingvo deprenas minimume tridek procentojn el la valoro de la eĉ plej sencohava interparolo aŭ konferenco – diras ekparolante Sandor Gaspar. – Tio estas fakto, kaj tion mi kuraĝas aserti kun plena certeco. Tiel okazas eĉ se nur unusola traduko peras la interparolon, sed foje-foje necesas eĉ tri kaj kvar interpretadoj, kaj tiukaze la perdo estas enorme granda.

– Ĉu vi dirus konkretan ekzemplon?

– Antaŭ ne tro longe ĉi tie en Hungario okazis iu granda konferenco de pedagogoj. Mi ne havis tie apartan farendaĵon, sed la kolegoj, okupiĝantaj pri la afero, petis min tamen partopreni la vespermanĝon, ja mi povos renkonti pedagogojn el ĉiuj mondopartoj. Do mi alvenis, kaj kiel en tiaj okazoj estas kutime, oni petis min, se vi estas jam ĉi tie, diru kelkajn frazojn, tion ili prenus kiel honoron. Do, mi diris kelkajn frazojn, kaj mi menciadis konvenan temon, en iom poezia stilo, alte taksante la pedagogan laboron: vi estas portantoj de torĉo de la kulturo, vi estas kunportantoj de nobla nektaro de la klereco, kaj tiel plu, kion decas diri, kaj jes ja, mi diris ĉion ĉi pro mia propra konvinkiĝo. Mi mem komprenas nur ruse kaj germane tiele-kiele, kaj tial mi atenteme aŭskultis, kiel tradukas niaj interpretistoj. Kaj imagu, kiel mi reaŭdis mian diritaĵon: «Vi estas la flamigistoj de lampoj, la akvoportantoj» – mi aŭskultis kun konsterniĝo. Tuj mi ĉesis oratori. Mi diris, fartu bone, bonan apetiton, mi deziras al vi ĉion bonan. Mi devas diri tre sincere: en tiaj okazoj oni sentas plej klare la gravecon kaj politikan neceson de la lingvo Esperanto. Por mi ĉiam ligiĝas Esperanto al la laborista movado tiel, ke por povi realigi la celojn, universalecon de la laborista movado oni bezonas tiun unuecan, facile ellerneblan, precizan kaj belan lingvon. La nuntempa laborista movado devas helpi per ĉiuj rimedoj, ke disvastiĝu Esperanto-movado, la Internacia Ling-

vo. Tial ni klopodis ankaŭ en la pasinto subteni ĉi tiun noblan aferon, tial mi akceptis ankaŭ nun la oficon de Alta Protektanto de la Universala Kongreso. Mi scias, ke la genia iniciatinto de la lingvo estis intelektulo, sed estas samtempe vero, ke Esperanto ekestis laŭ la bezono de la tiutempa laborista movado en Eŭropo, la neceso kaj postulo konceptiĝis en la laborista movado, en tiu ĉi evidente internacia movado. Estas enorma valoro, ke ĝi donas al neniu, al la filoj de nenia granda aŭ malgranda nacio senjustajn avantaĝojn, neniun ĝi puŝas en la humiligitan staton de la komplekso de malsupereco.

«... estas damaĝe ne agi, se la kondiĉoj estas jam maturaj«

Mi mencias, ke en la unua parto de la jarcento la junaj faklaboristo-kandidatoj «migris», per helpo de la sindikatoj ili vizitis tutan Eŭropon por akiri spertojn kaj lerni ankaŭ lingvojn. Krom tio ankoraŭ ne ekzistis vera internacia turismo de laboristoj, ĝi formiĝis nur post la dua mondmilito. Nuntempe somere dekmilionoj da laboristoj, laboruloj vojaĝas en la landon unu de la alia, ni estas atestantoj de vera moderna popolmigrado. Multaj milionoj provas mizere permaneperpiede klarigadi, kaj ili vane pasigas semajnojn en fremda lando, ili malkapablas penetri sub la ŝajnon, sub la surfacon, ili preskaŭ surde, blinde stumbladas tie, kie ili povus esti familianoj kaj bonaj amikoj, se falus la lingvaj baroj.

– Vere estas tiel – diras profundiĝinte en pensoj Sandor Gaspar. – Niaj patroj ne hazarde eltrovis la «migradon», ja por la laboristo estis demando de ĉiutaga pano vastigi siajn metiajn konojn, kaj samtempe lerni ankaŭ lingvojn. Tiun eternan veron ni ofte aŭdis tiutempe: «ĉiu homo tiom valoras, kiom da lingvoj li parolas». Sed estas vere, ke tre malfacilas ellerni eĉ nur sur tolerebla nivelo la etnajn lingvojn kun ariĝantaj esceptoj, neregulaj konjugacioj, miljaraj mallogikaĵoj. Kaj kion faru la laborista turisto konanta nur la germanan ekzemple en Hispanio, aŭ sur la francaj marbordoj. Ĉu li parolu nur kun la germanaj, aŭstraj laboristoj-amikoj? Tial estus mirinde, se la gajaj partoprenantoj de la granda moderna popolmigrado povus interamikiĝi pere de unusola lingvo, pere de la logika, facila kaj melodia Esperanto.

En la sekvaj minutoj ni serĉas la vojojn al la futuro. Kiel eblus plie helpi la disvastiĝon de Esperanto? Ĉu per novaj rezolucioj? Ankaŭ per ili, nature, sed laŭ Sandor Gaspar ne tio estas la baza.

– Eble, mi malpravas, tamen prefere nun mi pensadu laŭte – li daŭrigis. – Kiam ni volas alpreni iun ajn novan elementon en la socia evoluo, eblas du bazaj malĝustaĵoj: se antaŭ la maturiĝo de la kondiĉoj, tro frue ni altrudas la aferojn, tio alportas gravan damaĝon. Sed estas damaĝe ankaŭ, se ni ne agas, kiam la kondiĉoj estas jam maturaj. Ĉu diri iun grandan kaj riskan komparon? Nu bone, mi diras: Lenin tiutempe eksplikis, ke ĵaŭde la revolucio estus ankoraŭ tro frua, sabate jam tro malfrua, oni devas ĝin komenci vendrede. Kiel bone estus scii en la ĉiutaga vivo, kiam estas tiu «vendrede»! Kiom da energio ni povus ŝpari, kiom pli fruktodona estus nia laboro!

«Ni ne rajtas rezigni pri la fiksita celo»

– *Kaj kiel vi rilatigas tion al Esperanto?*

– Ni ne rajtas vivi en iluzioj, ke ni faros kelkajn bombastajn rezoluciojn en UN aŭ en UNESKO aŭ en la Monda Federacio de Sindikatoj, kaj tio kaŭzos la disvastiĝon de la lingvo. La vero estas: *ju pli multaj rekonos ĝian neceson, ĝi disvastiĝos des pli rapide!* Ĝi disvastiĝas hodiaŭ ankoraŭ ne tiel rapide, kiel ni ŝatus. Ekde kiam predikas la eklezioj la Dek Ordonojn? Antaŭ kiom da miloj da jaroj Moseo reportis la tabulojn el Sinajo? Kaj hodiaŭ ĉu ĉiuj kredantoj observas ilin? Ĉu neniu plu ŝtelas, murdas, adultas? Ni ne devas tuj paniki, se forrestas la tuja sukceso. Se ne nia generacio, tiam la sekva komprenos, ke ne eblas ekzisti sen ĝi. Ni esperas, ke la homo de la 21a jarcento ankaŭ en tiu ĉi rilato estos alia, pli saĝa. Ni tenu vivanta, ni subtenu, fortigu la aferon de la Internacia Lingvo, ni plenumu paciencan konvinkan laboron, sed ni komprenu: uzante nian marksisman terminologion ĝi fariĝos «materiala forto» nur, se milionoj rekonos ĝian neceson, kiam ĝi penetros en la amasojn. Ni ne rajtas rezigni pri la fiksita celo.

– *Ĉu tion vi mesaĝas ankaŭ al la partoprenantoj de la Universala Kongreso?*

– Jes. Kaj ankoraŭ ion: se oni faras ion, oni prenu tion tre serioze. Estas mia konvinkiĝo, ke la Budapeŝta kongreso povos proksimigi la homaron al la celoj de Esperanto-movado.

András *Sugár*

75 jaroj de UEA

Dum la 63a Universala Kongreso de Esperanto en Varna, en sia parolado pri la taskoj kaj la rolo de la Universala Esperanto-Asocio, d-ro Humphrey Tonkin emfazis, ke la Asocio ne estas nur sidejo aŭ oficejo, sed Universala Esperanto-Asocio estas mem la esperantistoj, ĉiuj parolantoj de la Internacia Lingvo en la mondo. Tiuj ĉi vortoj elokvente karakterizas nian asocion, ĉar UEA estas la sola organizaĵo en la mondo, kiu sukcesis starigi tiel vastan reton de delegitoj. La delegitoj aŭ la „konsuloj", kiel oni nomis ilin pli frue, estas la multaj sensalajraj oficistoj de la Asocio. La lasta jarlibro de UEA, la eldono por 1982, enhavas 3597 delegitecojn, kaj ne hazarde tiu ĉi fakto surprizas la neparolantojn de la Internacia Lingvo, ĉar kiu monda asocio sukcesis organizi tiel elastan delegitan reton, kapabla plenumi tion da multnombraj kaj diversaj servoj kaj taskoj?

La neesperantistoj miras pri tio, sed la esperantistoj bone scias, kian longan kaj malfacilan vojon devis trairi la Universala Esperanto-Asocio de sia fondiĝo ĝis nun.

Kiam en 1908 la 21-jara Hector Hodler fondis la Asocion, li bone sciis, ke li entreprenas laboron malfacilan kaj zorgoplenan. Li bone sciis, ke oni ne tuj kaj ne kun entuziasmo akceptos lian ideon, sed li estis konvinkita, ke la esperantistoj bezonas asocion kiu plifaciligos la rilatojn inter la diverslingvanoj kaj kreos „fortikan ligilon de solidareco inter la membroj", kaj ĝuste tiu ĉi principo iĝis la unua punkto en la Statuto de la nova organizaĵo, iniciatita de Hodler.

En la komenco ankaŭ Zamenhof dubis pri la entrepreno, sed li bone komprenis la signifon de la nova Esperanto-organizaĵo, sed kiam en 1908, dum la Kvara Kongreso en Dresdeno, UEA kunvokis siajn anojn, Zamenhof kuraĝigis ilin per la vortoj: „UEA estas la plej grava institucio de Esperantismo."

Sed la kuraĝigaj vortoj de Zamenhof ne sufiĉis por la solvo de la malfacilaĵoj kaj problemoj kiuj staris antaŭ la Asocio.

Dum la malfacilaj jaroj de la Unua Mondmilito la Asocio devis batali por la unuiĝo de la esperantistoj, devis rezisti la naciisman ondon kiu minacis penetri en la movadon, kaj en la sama momento UEA donis praktikan modelon de internacia solidareco pri la vasta helpado al militviktimoj ĉie en Eŭropo. UEA ligis kontaktojn inter familianoj, dividitaj de la milito, starigis kontaktojn kun kaptitoj, serĉis perditajn personojn.

Dum tiuj jaroj, kaj ĉefe en la postmilita periodo, la membronombro de la Asocio signife kaj rapide kreskis: de 6332 en 1923 al 8265 en 1924 kaj al 9424 en 1925. Kune kun tio kreskis ankaŭ la internacia rekono de la Asocio.

En la tridekaj jaroj, kiam financa krizo minacis la Asocion kaj ĝi ekstaris antaŭ la bankroto, UEA sukcesis trovi elirvojon kaj la jaron 1935 ĝi finis sen deficito. Tamen pro la altaj vivokostoj en Svislando, en 1936 la Asocio devis transporti la Centran Oficejon de Ĝenevo al Londono. Ankaŭ tiu paŝo ne estis facila kaj ne okazis senprobleme, sed malgraŭ ĉio, estis fondita la Internacia Esperanto-Ligo kun propra domo en Rickmansworth, apud Londono, kiu transprenis la rolon de UEA kaj plukonstruis la delegitan reton.

La periodo de la dueco estis malfacila, sed triumfis la bona volo kaj deziro krei unuecan organizaĵon: en 1947, dum la 32-a UK en Bern, la du asocioj kuniĝis sub la nomo de UEA.

La kontrakto subskribita en Bern ne nur stabiligis UEA-n, sed firmigis ĝian internacian aŭtoritaton. La ideo pri internacia kunlaboro ricevis per la fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO pli firman bazon, je kiu UEA povis sin apogi per siaj proponoj por pristudo de la lingva problemo kaj siaj rezulucioj kontraŭ lingva kaj rasa diskriminacio.

Kun la sidejo en Roterdamo komenciĝis nova periodo por UEA. La Asocio ne nur proksimiĝis al la idealoj de UN kaj Unesko, sed konsekvence ĝi subtenas ilin. Rimarkinda estas la celkonscia kaj obstina agado de UEA por la solvo de la lingva problemo. UEA estis, kiu proponis, ke la neregistaraj organizoj okazigu simpozion pri la rajto je komunikado, UEA estis, kiu prezentis al la Komisiono pri Problemoj de Komunikado detalan komentarion pri la graveco de la lingvo, kiel problemo kaj la solvo de internacia komunikado, UEA estis tiu, kiu prezentis studon pri la tradukaj servoj en internaciaj organizoj, en kiu ĝi pledis por studo de Esperanto kiel ebla solvo de la nunaj malfacilaĵoj en la lingvaj servoj.

Estas malfacile listigi ĉiujn agadojn de UEA, estas malfacile mencii ĉiujn taskojn kiujn plenumas la oficejoj de UEA en Roterdamo, Nov-Jorko, Budapeŝto ktp.

Nun, post la 75-jara ekzisto de UEA ni konstatas, ke la interna strukturo de UEA ne malfortiĝis, ke UEA ne fendiĝis, ne politikiĝis. UEA restis fidela al la dua punkto de la unua Statuto: „neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco", sed kiel d-ro Tonkin emfazis en sia kongresa parolado en Lucerno, en 1979, la Asocio estas neŭtrala ne simple por eviti certajn aferojn (politikon, religion ktp), sed „estas neŭtrala por esti kiel eble plej vaste universala – por enpenetri ĉiujn landojn, sendepende de ilia politika pozicio aŭ ilia rilato al aliaj ŝtatoj."

Universala Esperanto-Asocio ekzistas kaj laboras por nova, pli komprenema, pli vivoplena mondo.

Georgi *Mihalkov*

Miklós Hubai

En la Nacia Parko Bükk

Amantoj de la naturo en Meza Eŭropo ĝenerale havas konojn pri la Montaro Bükk, pri tiu interesa karsta pejzaĝo, plej alta montarbloko de Hungarlando; en kies krutajn intermontojn nur obskure penetras la sunlumo, fojfoje rebrilanta desur la klarakvaj, rapidaj fluoj; kie plejsupre, kvazaŭ desur balkonoj, ĉiuj horstoj prezentas malsamajn, ravajn panoramojn al la suba ĉirkaŭaĵo.

La popola imago konsideris ĝin *tablo de gigantoj.*

Multajn altiras la unikaj flaŭro kaj faŭno: la mezloke troveblaj botanikaj raraĵoj, la neĝenita asociado de vegetaĵoj en la t.n. Praarbaro, aŭ la raraj bestoj de la varmaj, sudaj deklivoj. Se tiuj ne kontentigos iun, tiu trovos por si aparte interesajn grotojn de prahomoj: Szeleta, Subalyuk (seleta, ŝubajuk) kaj aliajn...

Jen kurioza montaro, kiu nur malfacile lasas malkovri siajn sekretojn... eĉ post pluraj jardekoj la sistema esplorado ree renkontas surprizojn por la ekspertoj, kiuj penetras en ĝian geologian pasinton aŭ observas ĝian nuntempan vivularon.

Post *Hortobágy* kaj *Kiskunság,* en 1976 estis en Bükk establita la tria Nacia Parko de la lando – kvankam la unua en montaro. *Nacia Parko Bükk* okupas – rondcifere – 39 mil hektarojn en du departementoj, kontaktiĝas kun urboj *Miskolc* kaj *Eger,* kun 20 vilaĝoj. La ŝtata dekreto, kiu establis NPB, tiel difinis ĝian destinon:

– Protekti la karakterizan kaj varian aspekton de la mezmontara pejzaĝo de Bükk, ĝiajn favorajn naturajn proprecojn, kaj gardi ĝiajn gravajn naturdonitaĵojn;

– gardi la kulturajn valorojn de la pejzaĝo;

– ebligi la sciencan esploradon laŭ ties bezonoj;

– ebligi taŭgan utiligon por la ferianta publiko, subteni la diskonigon pri la naturo; krome

– servi la medioprotektadon kiel tiucela modelregiono.

Promenu kun ni

kompreneble perpiede, kvankam trafikas ankaŭ la Arbara Fervojo de *Szilvásvárad* kun pasaĝeroj tra la belega *Szalajka-valo,* kiu jam depost 30 jaroj estas leĝe protektata. Ĉiujare 300 mil vizitantoj venas tien...

Ni preteriras fiŝlagojn, trutolagetojn – aŭtoj tien ne envenas... Fonto ŝprucas el roko, poste ni eniras en *subĉielan arbarmuzeon* – unu el la plej vizitataj muzeoj de la lando –, kiu demonstras la penigajn laborojn de la arbaraj homoj. Poste ni admiras la *Vual-kaskadon,* kiu kreiĝis sur kalktufo-benkoj; se ni havas bonŝancon, eblos observi ĉe la rando ankaŭ la akvon gustumantan birdeton, la cinklon. Baldaŭ ni alvenos al la finstacio de la eta fervojo, kaj iom trinkante el la kristale klara karstakvo de la Szalajka-fonto, ni supreniras al la iama hejmo de la prahomo, al la *Istállóskő-groto.* Grandiozaj dimensioj, spirhaltiga vidaĵo kaptas niajn pensojn... la terure malfacila lukto

Szilvásvárad kaj la ĉirkaŭaĵo estas unu el la plej belaj ekskursaj celoj de Hungario

La ĉevalaro „Lipica"

de la prauloj por la ekzistado deproksime senteblas!

Sed atendas nin la plej alta pinto de Bükk: *Istállóskő*. Supren, pli supren ni strebadas, ĝis ni atingas la supron, 959 m super la maro. Post iom da ripozo ni iras en agrabla ĉirkaŭaĵo plu al la *Praarbaro*. Unika ĝi estas el inter la praaj arbaroj de Eŭropo, ĉar en tiun fag-arbaron ne enmiksiĝas koniferaj arboj. Ĉiuj arbo-generacioj kune vivas tie: iujn ŝiras ventoj, aliaj daŭre kreskas; la naturo zorgas pri ili laŭ sia memreguliga sistemo. Domaĝe, jam nur nemultaj similaj ekzistas!

Sur markita pado ni iras plu – la tutan landon eblas ĉirkaŭiri laŭ tiu *blue markita* pado – al *Tarkő* (Kalva ŝtono), de kie oni ĝuas la plej belan panoramon al valoj kaj pintoj de la montaro, eĉ al la historia urbo Eger. Post la plezurdona ĉirkaŭrigardo ne longe daŭras atingi al vera trezorejo de la Nacia Parko, al la „Granda Kampo" (Nagymező).

Verdire ĝia aspekto kreiĝis nur sekve de la industria produktado, dum la 18a jc., kiam la arbaroj estis tie dehakitaj por hejti fero- kaj vitrofabrikojn. La postrestinta tereno estis utiligita kiel paŝtejo. Nuntempe vaste videblas sur la blanka karsta kalkŝtono kvazaŭ ŝtonŝtupoj kaj rokkrestoj; inter ili viciĝas egaj telerformaj malaltiĝoj kaj funelformaj enfaliĝoj (akvoglutejoj). La ravan pejzaĝon kolorigas multfaceta vivularo, precipe abunda flaŭro.

La klimato estas ekstreme altmontara, kun jara precipitaĵo de 800 mm. Landan rekordon atingas la 120 frostaj tagoj dum la jaro! En la senarbaj funeloj eblas ĉiumonate rimarki malaltan temperaturon sub 0 C° – escepte junion (ekz. je la 7a de *julio* 1964 oni mezuris -7, eĉ -8 C gradojn).

La malvarma mikroklimato subtenis la pluekziston de pluraj specioj de glaciepokaj insektoj kaj kreskaĵoj, inter aliaj de Sub-Alpaj kaj Karpataj specioj (precipe de la nordaj deklivoj kaj ĉerande de fagarbaroj). Sur la varmaj, rokoplenaj sudaj deklivoj vivas arbaraj kaj senarbejaj surrokaj herbospecioj, konservantaj sin el la postglacia varmiĝo.

Ni preteriras sin paŝtantan ĉevalaron: junaj idoj de „Lipica" ĉevalaro tie ĉi bredata trejnas sin sur la tereno kiu similas al ilia karsta hejmo en Balkano.

Atingante la plej altan pejzaĝon (Bánkút) oni ne miras, kial vintre ĝi transformiĝas paradizo de skiantoj, kie sportas ofte 4-5

Bordo de Szinva. Foto: T. Szitta

miloj je semajnfinoj. Ni plu promenas en maturaj fag-arbaroj, sub jarcent-aĝaj gigantoj. La Nacia Parko Bükk estas ja preskaŭ plena de arbaro, kiu produktas cetere bonegan materialon. Kiel hejtilo ĝi grave diferencas de alispecaj energiaĵoj, ĉar ĝi kapablas dum relative mallonga tempo reprodukti sin. Musko, kuracherboj, fungo kaj lignokarbo kompletigas la trezorojn de la arbaro, kaj multaj aliaj kromproduktoj, ekzemple valoraj ĉasbestoj.

Estas konate, ke la arbara vegetaĵo ŝirmas la grundon kontraŭ erozio kaŭzita de ventoj, kaj ĝi protektas la purecon de la fontakvoj. La arbaroj riĉigas la aeron per oksigeno kaj filtras el ĝi la polvon, protektas la ekskursantojn somere kontraŭ la arda sunbrilo kaj la urba bruego... Jen la tri destinoj de la arbaroj: la produkta, protekta kaj soci-bonfartiga funkcioj! Tiun principon antaŭ jardeko akceptis la 7a Universala Kongreso de Forstistoj en Buenos Aires, laŭ hungara propono.

Enfaliĝejoj sur Nagymező. Foto: T. Szitta

La fag-arbaro – dum sia 120-jara vivdaŭro – 7-8 foje devas renkonti la hakilon. Atingante 100 jarojn fago komencas maljuniĝi. Tiam forstistoj – specialistoj de la arbar-mastrumado – eklaboras por la nova arbara generacio. Ili produktigas semojn de la arboj, poste en sem-bedoj kreskigas arbidojn kaj transplantas tiujn brose-dense sub la maljunajn arbojn. Tiuj baldaŭ estos finintaj la vivon: pro kadukiĝo ili iom post iom frakasiĝus (sen la homa interveno), pereante kiel taŭga materialo. La naskiĝantan novan arbaron jam ŝirmos dika neĝtavolo, kiam la restintaj maljunaj arboj estos faligitaj kaj fortrenitaj.

Tra romantika arbara vilaĝeto *Ómassa* (oomaŝa), kie vivas germanoj kaj slovakoj, ni alvenas al la finstacio de la etŝpura Arbara Fervojo de Lillafüred. El la vagono ni rigardas la restaĵojn de la iama industriigo; la „pra-fornon" kaj la Lagon Hámori, kreitan per ŝveligo de la rivereto Garadna. Kie alfluas la rivereto Szinva, ni descendas por viziti sub la luksa Palachotelo la unike grandiozan kalktufo-kavernon „Petőfi", ties eksterordinarajn figurojn, la fantastikajn fabellandon kvazaŭ de la Mil- kaj -unu-noktoj.

Preter la rivereto, fluanta en mallarĝa ravino, tra tuneloj kuras la arbara vagonaro al la granda industria urbo Miskolc – kaj ni aŭdas al Bükk. Kvankam ni vidis nur partojn el la naturtrezoroj de la Nacia Parko, en la memoro, eventuale en la filmkasedoj, ni kunportas la viditajn kaj spertitajn dum tiu longa sed plezurplena tago.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Karbigado de ligno. En Bükk tradicia flanklaboro de arbarmastrumo. Foto: J. Ács

Lago meze de la urbo, je nur kelkaj trolebusstacioj for de la Kongresejo. Ideala loko por dumtaga refreŝiĝo (Foto de Z. Fejér)

Tegmentoj apartenas al la dekoroj de urbo, ili kvazaŭ difinas ĝian etoson. Jen, unu el la plej belaj en Budapeŝto (Foto de Z. Fejér)

Urbo kaj naturo lastatempe fariĝas konceptoj ĉiam pli kontraŭdiraj – ankaŭ en Budapeŝto. Tamen, la hungara ĉefurbo, dank' al siaj montaj kvartaloj en Buda, povis konservi ankoraŭ multe da naturbelaĵoj



Horo da meditado sur la Danuba bordo estas vere ripoziga



La Fiŝkaptista Bastiono kaj Margarita Insulo el nekutima perspektivo (Foto de Z. Fejér)



Unu el la belaj forĝitaj pordoj (Foto de Z. Fejér)



Domfasadojn rimarkas nur atentaj okuloj kaj «leviĝemaj» kapoj. En la historiaj kvartaloj de Budapeŝto indas levi la kapon, kiel pruvas ankaŭ la ĉi-apuda ekzemplo (Foto de Z. Fejér)

Tiuj ĉi puntoj
certe trovos aĉetantojn

Pasinto
kaj
nuntempo



Freŝa naturo tuj apud la urbocentro – verŝajne unu el la ĉefaj atutoj de la hungara ĉefurbo

Regionoj de Hungario

Departemento



Győr-Sopron

La departemento, konsistanta iam el tri memstaraj administraj unuoj (Győr, Sopron, Moson), donis hejmon al multaj popoloj de Eŭropo kaj Azio. Ilirajn tribojn postsekvis ĉi tie keltoj en la 2a jc. a.K.; Romianoj levis la murojn de la fortikigita Scrabantia-Sopron (pron. ŝopron), gardantajn la traeŭropan vojon al la sukcenejoj ĉe la Norda Maro; post la falo de la Romia regado, ekde la 5a jc. p.K. trakavalkadis ĉi tie Hunoj, Gotoj, Longobardoj, Avaroj kaj Frankoj. Ĉi tie plurajdis okcidenten hungaraj taĉmentoj en la 10a j.c., renkontiĝante kun la kristanigita Eŭropo. Kaj ĉi tie, inter la marĉoj de Hanság (hanŝag) aperis fajre-glave konkeremaj feŭdestroj el Okcidento kaj sangavidaj mongolaj hordoj el Oriento. Tiu ĉi tereno servis en la 16-17a jc. ŝilde kaj bastione al la kristana Eŭropo, retenante aŭ malpliigante la superpremon de turkaj armeegoj, marŝantaj al Vieno. Pro ĝia graveco Napoleono propramane signis en Győr (djoer) la bastionojn, kondamnitajn al eksplodigo. Kaj en Sopron estis la lasta sanga provo de la faŝismo reteni sur hungara tereno la venke antaŭeniĝantajn sovetajn trupojn.

Post tiom da historiaj turnoj fluas nun pli trankvilaj akvoj en Danubo, Rába, Rápca kaj Marcal. Ĉe ilia kunfluo leviĝas Győr, la natura kaj fakta (administra kaj industria) centro, havanta 130 mil loĝantojn. Pro ĝia favora geografia situo (riveroj, vadejo kaj sola pasejo inter Okcidento kaj la landinterno) destinis ĝis la unua hungara reĝo – Stefano la Sankta (997-1038) – regiona centro, i.a. per la plukonstruigo de la Romia fortikaĵo kaj fondo de episkopejo, komence de la 11a jc. En 1271 ĝi ricevas urbajn rajtojn. En la 16a jc. elkreskas ĉirkaŭ la urbo renesanca fortikaĵa sistemo, la plej grava kaj potenca en la lima fortikaĵĉeno. En la novepoko la urbo fariĝas centro de grenkomerco, kaj en la 2a duono de la 19a jc. komenciĝas forta kapitalisma evoluo, kiu levas Győr je la rango de la plej grava industria centro post Budapeŝto kaj Miskolc. Elstaras la peza industrio (dizelaj motoroj, kamionoj, pezaj traktoroj, agrikulturaj kultiviloj estas pro-

Preĝeja turo en Pannonhalma (Foto de Z. Fejér)



Statuo en Pannonhalma: patrino kaj filo (Foto de Z. Fejér)



Panoramo de Győr

duktataj en la Hungara Vagon- kaj Maŝinfabriko Rába), sed tradicia kaj alte evoluinta estas ankaŭ la teksindustria branĉo (delikataj ŝtofoj, artefarita ledo, puntoj, por-kurtenaj teksaĵoj) kaj la nutraĵa industrio (dolĉaĵoj, alkoholaĵoj, konservaĵoj, vegetaĵa oleo ktp.).

Urbonorde, sur natura altaĵeto, ĉe la kunfluo de Danuba branĉo kaj Rába leviĝas la muroj de la iama kultura, administra kaj eklezia centro: la baroka episkopa palaco kun la iama rezidejo, la „Episkopa" loĝoturo, levita sur restaĵoj de la Romia urbo Arrabona. Kontraŭ ĝi imponas la katedralo, mirinde paciganta en harmonion stilojn de jarmilo (romanika fundamento, gotikaj muroj, baroka interno, klasikisma fasado). En ĝia gotika kapelo troviĝas relikvujo, figuranta la kronitan kapon de la „kavalira" reĝo, Ladislao la Sankta (1077-1095), ekzemplante la majstrecon de la mezepoka hungara cizelarto, (emajlita kaj orita arĝento). La monteton ĉirkaŭas la restaĵoj de la mezepoka kaj renesanca bastionaro.

La burĝa suburbo kun siaj barokaj palacoj kaj post iu granda incendio rektlinie rekonstruita strataro kerne enfermas la placon Széchenyi, unu el la plej ĉarmaj barokaj placoj de Hungario. Ĉi tie staras la iama jezuita (nun Benediktana) preĝejo du-tura, interfermita ambaŭflanke de Benediktanaj monaĥejo kaj gimnazio. La iama Karmelana preĝejo en la okcidenta ekstremo de la malnova urbokerno havas ovalan fundamenton, sur kiu leviĝas kupolece mirinda baroka volbo. La ŝtone repavimita interna urbo revokas la etoson de riĉa burga civilizo.

Pluveturante norden, ĉe la maldekstra branĉo de Danubo (nomata Mosoni Duna) atendas nin ĉarma urbeto Mosonmagyaróvár (moŝonmadjaroovaar), loĝiĝanta 30 mil homojn. La fortikaĵo de la iama departementa centro Moson kaj tiu – iom pli malfrue konstruita – de Magyaróvár ludis gravan rolon en la hungara historio kaj kromnomiĝis „porta Hungariae" (pordo de Hungario). En la ĉi lasta fortikaĵo funkcias nun agrikultura universitato. Bone konserviĝis la ĉefaj muroj, du turoj, kazamatoj kaj fosaĵoj. En la stratoj Magyar kaj Bástya allogas la okulojn pluraj burĝaj loĝdomoj el la baroka kaj klasikisma tempoj. La formoriĉon de la etosgarda interna urbo kronas la majesta baroka preĝejo sur la placo Szent László.

Relikvujo, figuranta la kapon de Ladislao I

Sude de Győr (20 km), defore videble superregas la pejzaĝon la abateja komplekso Pannonhalma sur la antaŭaltaĵoj de la montaro Bakony. Jam Karlo la Granda konstruigis ĉi tie preĝejon honore al Sankta Marteno, naskita laŭ legendo ĉi-proksime. La fundamenton de la nuna baziliko metigis duko Géza (? -997) kaj plukonstruigis ĝin la filo, Stefano la Sankta, aligante monaĥejon por Benediktanoj, kiuj de tiu tempo kontinue disvolvas netakseble valoran klerigan, konstruan, edukan kaj kulturan agadon. La biblioteko estas tre fama pro la bela interna arkitekturo kaj riĉa enhavo (manuskriptoj, inkunabloj, dokumentoj, ĉi tie oni gardas la plej malnovan aŭtentikan lingvan memoraĵon hungarlingvan, la fondateston de la abatejo Tihany el 1055). Krome funkcias ĉi tie gimnazio kaj teologia altlernejo.

Ĉe la okcidenta landlimo situas Sopron (50 000 loĝantoj), trezorejo de arkitekturaj memoraĵoj, kiu pro la

Domoj en Sopron, konstruitaj en la stilo de „popola baroko"

ekzemplodona flegado de siaj konstruartaĵoj ricevis ŝtatan distingon kaj internacian rekonon. La pasinteco ĉiupaŝe okulfrapas ĉi tie la vizitanton: la restaĵoj de Romiaj forumo kun statuoj kaj urbomuroj, duone kaŝiĝantaj aŭ elvolvitaj romanikaj kaj gotikaj fasadoj, dominternoj, renesancaj kaj barokaj palacoj, mezepokaj bastionoj, puntofajnaj kampaniloj – ne mortofremde, sed kun funkcio kaj viva vervo partoprenas la ĉiutagojn de la urbo. Ricevinte en 1277 urborajton, Sopron travivis relative trankvilan sorton, kiu favoris al la disvolviĝo de la burĝa civilizo kaj kulturo. Sekve netakseble valoraj estas ĝiaj historiaj memoraĵoj kaj artkolektoj por la hungara kulturo. Interne de la urbomuro konserviĝis unika arkitektura ensemblo, spiranta historian etoson. Sopron estas studenta urbo kun pluraj mezlernejoj kaj Forstkultura kaj Lignaĵindustria Universitato. La Ŝopronaj Festivalaj Semajnoj estas Eŭropa-vaste famaj. La ĉeurbaj antaŭ-Alpoj estas ŝatata ripozejo kaj ekskursejo.

Inter Győr kaj Sopron situas la vilaĝo Fertőd (fertoed), kies unika vidindaĵo estas la „hungara Versajlo", la plej pompa baroka kastelo de Okcidenta Hungario. Ĝin konstruigis princo Miklós Esterházy, en kies servo vivis ĉi tie dum 20 jaroj Joseph Haydn. La 126 luksaj ĉambroj enhavas valorajn kolektojn de porcelanoj, pentraĵoj kaj ceteraj artaĵoj.

Unika vidindaĵo estas ankaŭ la preĝejo de Lébénymiklós (lebenjmiklooŝ), proksime al Győr. Konstruita komence de la 13a jarcento, ĝi estas unu el la plej belaj kaj grandaj romanikaj monumentoj de Hungario. Italaj konstruistoj, senditaj por forporti ĝiajn ŝtonojn por la fortikigo de Győr, trovis ĝian simplan majeston tiel admirinda, ke ili rifuzis la ordonon.

La departemento havas konsiderindajn tradiciojn Esperantajn: jam en 1910 fondiĝis grupo en Győr, eldoniĝis gazeto (Panonio), kaj en 1919 eklaboris ankaŭ laborista grupo, kiu ĉesis en 1930 pro politikaj persekutoj. Post la 2a mondmilito okazigis Győr Landan Esperanto-Kongreson (1948), dufoje Junularan Esperanto-Renkontiĝon kaj Landan Fervojistan Esperanto-Renkontiĝon. La movado evoluas sur solidaj bazoj.

József *Gy. Horváth*

Sopron–Lőverek

Hungaroj por la paco

Doloran aktualecon havas nuntempe la pacbatalo ĉie en la mondo: antaŭvideble fine de tiu ĉi jaro oni komencos la lokigon de novaj raketoj en kelkaj landoj de Okcidenta Eŭropo. Kaj se tio vere okazos, la mondo versajne frontos novan, timigan kaj ekonomie elĉerpan etapon de la vetarmado.

La kunordiganta organo de la hungara pacmovado estas la Nacia Konsilio de Paco, kies agado ĉiujare kulminas en majo, kiu estas Monato de Paco kaj Amikeco. Dum tiu ĉi monato okazas miloj da packunvenoj en la tuta lando, kiujn partoprenas centmiloj da hungaroj el ĉiuj socitavoloj (laboristoj, kamparanoj, oficistoj, intelektuloj), personoj kun la plej diversaj ideologioj (komunistoj, adeptoj de diversaj eklezioj, homoj sen ideologia engaĝiteco ktp). Dum tiu ĉi monato la Nacia Konsilio de Paco transdonas la distingajn insignojn de la hungara pacmovado al la plej fervoraj aktivuloj de la pacbataloj. Inter la distingitoj ĉiujare troviĝas egale laboristoj, elstaraj artistoj kaj ne malmultaj pastroj. Pluraj esperantistoj jam posedas tiun ĉi distingan insignon, interalie ankaŭ la redaktoro de tiu ĉi revuo.

Elstara evento de la ĉijara Monato de Paco kaj Amikeco estis granda junulara pacdemonstracio okaze de la datreveno de la Tago de la Venko. Ĝin partoprenis dekmiloj da gejunuloj, por kiuj paco pleje gravas, ja ili havas la plejparton de la vivo antaŭ si, kaj ili deziras vivi sian vivon en paco. Ili ĉiuj naskiĝis post la dua mondmilito, sekve ili ne havas konkretajn spertojn pri la militaj suferoj, sed ili eĉ ne deziras akiri tiujn.

En majo la Nacia Konsilio de Paco havas ankaŭ sian plej grandan gazetaran konferencon. En tiu ĉi konferenco oni informas la ĵurnalistojn pri la celoj kaj atingoj de la pacmovado, kiuj – dank' al la aktiva gazetara reeĥado – estas sufiĉe bone konataj al la tuta hungara popolo.

Majo estas kulmina tempo de la pacmovado, tamen, tio ne signifas, ke dum la ceteraj dek unu monatoj paŭzas la pacbatalo. Hungaraj pacbatalantoj – inter ili grandnombre esperantistoj – estas aktivaj dum la tuta jaro; ekzemple, fine de junio grandnombra hungara delegitaro partoprenis la Mondan Paĉrenkonton en Prago.

Paco estas komuna trezoro de ni ĉiuj. Tridek ok jarojn post la finiĝo de la lasta granda milito en Eŭropo oni facile povas preni ĝin kiel io evidenta, natura, sed sufiĉas ĵeti nur rigardon al la statistikaj informoj pri la armiloj akumulitaj en Eŭropo, kaj tuj oni komprenas, ke paco estas io delikata, konstante protektinda! Kaj la protektado de tiu ĉi komuna trezoro same estas la tasko de ni ĉiuj.

Meto de krono sur heroan monumenton

Ĉe transdono de distingoj pro pacmovada aktivado

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

10. SOVETAJ RADIKOJ

En la unua etapo de la Esperanto-movado (1887-1905) ĝia Ruslanda alo estis la plej multnombra, sed pro la cara burokratismo ĝi restis sen organizaĵoj kaj sen eldonaĵoj. En la dua etapo (1905-1917) la rusaj esperantistoj agadis pli libere, tamen, eĉ post la 1917-a Februara Revolucio ili ne havis landan organizaĵon. Tiu stato daŭris ankaŭ post la Oktobra Revolucio, dum la pezaj jaroj 1917-1920, kiam, malgraŭ la monda, civitana kaj intervenciaj militoj, ne malpli ol 100 Esperanto-societoj funkciis en la lando, eldonante la saman nombron de bultenoj.

Malbonaŭgura koincido

La eventualaj rilatoj de Lenin al Esperanto estas multe diskutata problemo. Multaj rememoroj, supozoj kaj asertoj aperis pri tiu temo en la Esperanto-gazetaro, plejparte kontraŭdiraj. Fakte ne estas efektiva pruvo pri – ĉu pozitiva, ĉu negativa – rilato de Lenin al la Internacia Lingvo. La sola nediskutebla fakto estas, ke, kiam en la katastrofa ekonomia jaro 1921 la esperantistoj petis permeson de la registaro (kies gvidanto estis Lenin) kunvoki Tut-Rusian Esperanto-Kongreson, *la registaro ne nur permesis, sed ankaŭ ebligis tion,* disponigante la necesajn fervojajn dokumentojn, loĝejojn kaj nutradon.

La unua postrevolucia, 3-a Tut-Ruslanda Esperanto-Kongreso okazis en Petrogrado, en 1921, kaj proklamis la fondon de la *Sovetrespublikara Esperanto-Unio* (SEU). La tiutempan movadon karakterizas iom la konsisto de la kongresa delegitaro. La 163 delegitoj estis laŭnacie: 114 rusoj, 13 judoj, 7 latvoj, 6 germanoj, 5 ukrajnano, 4 estonoj, 4 poloj, 2 litovoj kaj 8 ceteraj; laŭpartie: 34 komunistoj, 10 socialistoj, 2 anarkiistoj kaj la eksterpartia plimulto; laŭprofesie: 74 intelektuloj kaj studentoj, 44 laboristoj, 33 oficistoj, 3 soldatoj kaj 3 neindikitaj.

Tri monatojn poste en la sama jaro fondiĝis en Moskvo alia, malgranda, sed tre aktiva organizaĵo: la *Rusa Mondolinguala Uniono* (Rusa Mondlingvo-Unio), kiun pli poste oni mencias kiel Rusa Idista-Asocio aŭ *Tut-Rusia Idista Unio.*



Sovetio estis la sola lando, kie samjare fondiĝis la landaj organizaĵoj esperantista kaj idista: SEU kaj TIU. Tiu stranga situacio promesis nenion bonan por la pluaj eventoj.

Komintern – ESKI – KIFINTERN

Malpli konata estas alia tiutempa iniciato: jam en 1920 Moskvaj komunistaj esperantistoj iniciatis apartan, komunistan internacian Esperanto-organizaĵon. Tiu *Esperanta Komunista Internacio (ESKI)* organizis internaciajn konferencojn en 1920 kaj 1921, sed restis malgranda kaj malforta, ĉar la komunistaj esperantistoj preferis labori en SAT, kiu fondiĝis en 1921, kaj kies plej forta frakcio baldaŭ iĝis la komunista.

Tiu ESKI klopodis veki la interesiĝon de la Komunista Internacio, kies sidejo estis en Moskvo. Je ilia iniciato la *dua kongreso de la Komintern en 1920 akceptis la decidon „Pri Esperanto",* laŭ kiu estis starigita *„Studkomisiono por alpreno de helpa lingvo en la III-a Internacio".* Do, temis pri la alpreno de ia helpa lingvo, sed ne pri la apliko de la Internacia Lingvo.

Tiu malklara vortumado signifas, ke la komisiono fakte havis la neeviteblan taskon: prijuĝi la problemon „Ido kontraŭ Esperanto". Kaj, kompreneble, tiun ĝi ne povis plenumi. La sekvo: post unu-du jaroj la komisiono jam estis likvidita, kaj la Komunista Internacio alprenis nenian decidon pri la apliko ĉu de Esperanto, ĉu de Ido.

Sed estis ankaŭ alia sekvo: la fiasko ne senkuraĝigis, sed male, aktivigis la komunistajn idistojn. Ili pli sukcese organiziĝis en la Ido-organizaĵoj, poste apartiĝis en grupojn, kaj fondiĝis *Komunista Ido-Federuro Internaciona* (KIFINTERN, Komunista Ido-Federacio Internacia), kies sidejo estis en Moskvo. Ĝi havis la organon *Nia Standardo* (1922-1926), germanan, francan kaj rusan sekciojn, kaj el Parizo oni komencis organizi ĝian junularan movadon. Malgraŭ la komencaj sukcesoj ĝi malaperis dum la lingvo-kriza periodo de la Ido-movado (1926-1929).

La ekfloro

Dum la malfortiĝo de la Ido-movado larĝe disvolviĝis la agado de la sovetaj esperantistoj. En la jaroj 1924-1930 oni forvendis 175 mil Esperanto-lernolibrojn. Lernado de Esperanto iĝis amasmovado, ekz. nur la Esperanto-kursojn de la Ukrajnaj sindikatoj en 1931-1932 partoprenis 14 mil personoj. La radiostacioj Moskvo kaj kelkaj aliaj urboj dissendis Esperanto-kursojn. Ĝis 1934 pli ol 200 libroj aperis en Esperanto.

La membronombro de SEU en 1939 atingis 10 milojn. Esperanto havis grandan rolon en la evoluo de la internaciisma sento, la movado forte


№ 1. Majo. 1912.

G. DAVIDOV.

TITOLARO

de ESPERANTAJ VERKOJ TRADUKITAJ EL LA

RUSA LITERATURO.

Kun antaŭparolo de B. Kotzin.

ELDONIS „ESPERANTA BIBLIOTEKO de GEORG DAVIDOV en SARATOV".

EL LA KOLEKTO DE FAJSZI KÁROLY GYŰJTEMÉNYÉBŐL BUDAPEST

Librejo „Esperanto" Tverskaja, 26. Moskvo. RUSLANDO.

Ĉe la autoro Georg Davidov Politkreto, 12. Saratov. RUSLANDO.

Prezo — 10 kop.

4712


Государственный Историко-Лингвистический Институт
Stata Histori-Lingvistika Instituto de RSFSR

Э. ДРЕЗЕН — E. DREZEN

ОЧЕРКИ ТЕОРИИ ЭСПЕРАНТО | SKIZOJ PRI TEORIO DE ESPERANTO

EL LA KOLEKTO DE FAJSZI KÁROLY GYŰJTEMÉNYÉBŐL BUDAPEST

1931

НК СОСР МОСКВА — LEIPZIG EKREDO

kontribuis al amikeco de la popoloj, kaj aparte interesa estis ĝia kontribuo al la soveta-germana amikeco (korespondado inter labor-kolektivoj ktp.). Do, kiel la popola komisaro por klerigo, Anatolij Lunaĉarskij jam en 1926 en Leningrado, dum la 6-a SAT-Kongreso rimarkis: „Tiu ĉi movado disvastiĝis kun nevenkebla potenco de la moderna socia vivo." *SEU iĝis la plej granda, laŭnombre ĝis nun ne superita landa organizaĵo en la historio de la internacilingva movado.*

La prezidanto de SEU estis *Ernst Drezen* (1892-1937), kies organizkapablo forte kontribuis al la ekfloro de la sovetia movado. Ankaŭ kiel teoriulo li estis eminenta. Liaj sciencaj esploroj, lia verkaro, estas fundamenta kontribuo al la esperantologio kaj interlingvistiko.

La radikoj

La ekfloron sekvis, de 1937, 15 jara silento, de la sovetia movado. Pri tio oni jam multe verkis en Esperanto, sugestante, ke la kaŭzo de tiuj tragikaj eventoj kaŝiĝas en la socialismo. Ni opinias male: ĝuste la manko aŭ la malforteco de la socialismaj rilatoj en la socia, politika kaj kultura vivo, en la ĉiutaga vivmaniero, ebligis kontraŭleĝan ĉesigon de valora kultura asocio. *Ne la socialismo, sed ĝia malforteco ebligis kontraŭleĝajn agadojn, tute fremdajn de la socialismo.*

La valoraj tradicioj de la soveta Esperanto-movado reviviĝis en la 1950-aj jaroj, kiam la iamaj SEU-aktivuloj plantis ilin en la renaskiĝantan sovetan movadon. El inter ili aparte menciindas la akademiano *Evgenij A. Bokarev* (1904-1971), kiu jam antaŭ la 20-a kongreso de KPSU (1956) estris Iniciativan Grupon de Sovetiaj Esperantistoj, la akademiano *Gurgen Sevak* (1904-1981), gvidanto de la movado en Armenio, kaj *Simeon N. Podkaminer* (1901-1982), iama gvidanto de la junulara sekcio de SEU, kaj konata MEM-aktivulo en la lastaj jardekoj.

La hodiaŭa soveta movado, krom la SEU-tradicioj, havas ankoraŭ unu, ne malpli gravan radikon, nome: *la valorajn tradiciojn de la baltlandaj esperantistoj,* en Estonio, Latvio kaj Litovio. Sed ĉi tiu artikolo jam ne ampleksas eĉ la skizon de la historio de tiuj gravaj taĉmentoj de la Esperanto-movado.

La hodiaŭa soveta movado kiel unueca tuto daŭrigas sukcese la komencitan laboron de la frutempaj esperantistoj. Ĝia aktivado koncentriĝas al la jenaj agadkampoj: *paco – junularo – scienco.*


Soveta Pedagogia Revuo

eldonata de „Rabpros" aperigata de Internacia Pedagogia Komisiono de „C. K. Pros": „SPR" aperas en apartaj kajeroj.

Abonprezo (enkluzive ekspedon) por 5 kajeroj estas en Sovetio unu rublon, por eksterlando — 1/2 amerik. dolar. Adreso: Moskvo, Dvorec Truda, Solanka 12, ĉambro 558, Redakcio de „Soveta Pedagogia Revuo" La abonprezon bonvolu sendi al Germanio: R. Lerchner, Colmstr 1. Leipzig 027, aŭ al Francio: M. Boubou, 96, rue Saint-Marceau, Orleans (Loiret), aŭ al Svedio: Göteborg, Box 73 Einar Adamson.

1

Enhavo:

De Redakcio.
Pistrak. Fruntartikolo.
Z. Liiina. Nia lernejo kaj la unua majo.
A. Lunaĉarski. N. K. Krupskaja kaj Popolkomisario por Klerigo.
P. Paribok. Strukt. de lab. por plikval.
Soveta lernejo kaj elektado de sovetoj.
A. Pĉelko. Vilaga Lern. en batalo kontr.
Plenkus. de Stata Scien. Sov de Popolk.
Popolkom. por Kler. help. al inf. de lab.
Konsultigo pri klerigo de malg. naciloj.

CKPROS Moskvo | Redaktoro: M. Ripletin. Redakcikolegio: Javoronkov, Modenov kaj Špicer. | Kajero unua — Majo — 1929

De Redakcio.

La „Soveta Pedagogia Revuo" celas informi pri Soveta kleriga laboro. En la gazeto estos presitaj artikoloj pri aktualaj demandoj de lerneja praktiko kaj pri pedagogiaj serĉadoj de soveta lernejo. Redakcio de „S. P. R." ne kontraŭdiros kontraŭ repreno de artikoloj kaj notoj en ekstersovetia nacia gazetaro.

La redakcio de „S. P. R." petas legantojn sendi notojn pri ĉi-tiu libro kaj deziresprimojn pri enhavo de estontaj lau adreso: Moskvo, Dvorec Truda, Solanka, 12, ĉam. 558. Redakcio de „Soveta Pedagogia Revuo".

Popola Komisaro

Komunismon oni ne povas studi nur per la libroj. Komunismon oni devas studi nur ligante akiritajn sciojn kaj ellernitan sperton de homa kulturo kun soci-produktiva laboro, kun senpera partopreno en ĉirkaŭanta vivo. Ne sufiĉas konatiĝo pri la vivo, estas necese refari, rekonstrui ĝin. Pri tio nin instruas

A. V. Lunaĉarski.

Pro tio soveta lernejo iom post iom ne plu similas ordinaran lernejon kie oni parkere lernas mezepokan skolastikon.

Senpera kunligo inter el la libroj akirita scio kaj partopreno por transformado de la vivo edukas lernanton kaj instruiston, ŝanĝas iliajn interrilatojn, kiuj tute malsimilas tiajn en lernejoj de kapitalistaj landoj. Intima amikeco,

EL LA KOLEKTO DE FAJSZI KÁROLY GYŰJTEMÉNYÉBŐL BUDAPEST

Poemoj de Sándor Petőfi

Kial vi ferme baras al mi vojon?

Kial vi ferme baras al mi vojon?
Min lasu iri!
Aspiroj tiras min antaŭen, tamen
mi volas nur utili, kaj ne brili!

Patrujo en danĝer', ĝi siajn filojn
por ag' bezonas;
mi staras sur la rokoj de l' esperoj,
al la anim' centobla eĥ' resonas.

Espero mia firmas, kiel roko
forta ne fali,
ke post mi restos nur honor' fiera,
ke por patruj' mi povos multe fari.

Sopir' de l' agoj, forto de la agoj,
torent' senbrida
trafluis min, kaj ĝiaj ŝaŭmoj muĝe,
sovaĝe falis al profund' granita.

Mi levas vidon al somera sun' per
okuloj spitaj,
kaj boras vidon en vortican fundon
sen kapturniĝoj kaj sen sven' subitaj.

En tagoj grizaj oni staras firme:
afer' ne granda;
sed kiam ĉiu ŝanceliĝos, restos
mi plu staranta!

Kaj venos tagoj de teruro, kiajn
kun mensa ebrio
dum lunaj noktoj nur en febraj sonĝoj
konceptas tim-freneza fantazio.

Premion, gloron por laboro mia
mi ne atendas,
por devoj ni ne volu rekompencon:
labori por patrujo deve endas.

La gloron mi rezignas facilkore:
vantaĵ' sencela.
Virin' koketa kial ja necesus,
kiam brakumas min edzin' fidela.

Kial vi ferme baras al mi vojon?
Min lasu iri!
Aspiroj tiras min antaŭen, tamen
mi volas nur utili kaj ne brili!

Tradukis: Vilmos Benczik

Mi diras certe, venkos nun hungaroj...

Mi diras certe, venkos nun hungaroj,
eĉ kontraŭ vol' de ter', ĉielo, maroj!
Ĝis nun ne venkis tiu ĉi popolo,
ĉar mankis unu kaj komuna volo;
nun jam komunas brakoj, kor', animo...
hungar', la venko estas en proksimo!
Patrujo tuta kunas, morti pretas,
tial vi nun, popol', al venk' impetas,
vi havos gloran vivon, kaj liberan,
feliĉan, kaj, pli ol aliaj, belan!
Mi spite fajron de l' batal' reblovas,
mi scias, kugloj kontraŭ mi senpovas,
mi scias, ŝirme gardas min la sorto,
kaj en batal' ne trafos min la morto,
ĉar nepre estos mi, post venko tuta,
se l' malamikojn kovros grundo muta,
vokit' prikanti la triumfon oran
de là liber', kaj la falintojn glorajn,
kiuj, libero, kaptis vin per sango,
kies mortkrio estis la lulkanto
por vi; mi devos vidi tiun tagon,
kiam vi bene levos vian flagon,
kaj ni post jaroj pezaj, damnoplenaj
ridetos, ploros pro la ĝojo svenaj,
kiam estos la krak' de l' rompo ĉena
por la naci' libera preĝ' solena!
Strebinte verse-glave celon sanktan,
mi devos vidi tiun tagon grandan!

Tradukis: Vilmos Benczik

En la nomo de la popolo

Ankoraŭ petas la popol' – nun donu!
Ĉu vi ne scias, kiel furioza
Estas popol' prenanta, ne petanta?
Ĉu vi ne aŭdis pri Georgo Dózsa?
Lin sur fertrono fajra vi bruligis,
Sed la spiriton fajro ne nuligis.
Li estas fajro mem! Vin bone gardu,
Ke kontraŭ vi ĉi fajro ne reardu! *

Nur manĝi petis iam la popolo,
Ĉar tiam havis ĝi nur bestajn trajtojn;
Sed fine tiuj bestoj iĝis homoj,
Kaj decas jam al homo havi rajtojn.
Do rajtojn, rajtojn volas ĉi popolo!
Esti senrajta – kia fisimbolo
Por diaj filoj; kiu ĝin adaptas,
La dia mano lin por puni kaptas.

Kial vi estas privilegiuloj?
Ĉar ĉiujn rajtojn al vi mem vi prenas?
Konkeris viaj patroj la patrujon,
Sed nun la jugon la popolo trenas.
Kiom valoras diri: jen la mino!
Necesas manoj, kiuj en la sino
De ter' pioĉas ĝis la vejnoj oraj...
Ĉu tiuj manoj estas senvaloraj?

Kaj vi, kiuj orgojle deklaraĉas:
Niaj la rajtoj, nia la patrujo!
Kion vi farus por via patrujo,
Se malamiko venus sen kalkulo...?
Kia demando! Mi preskaŭ forgesis:
Napoleono bele vin karesis.
Kiam okazos en Győr inaŭguro
De monumento al la glora kuro?

Por la popolo rajtojn, en la sankta
Nom' de homaro, donu rajtojn, donu
En la nom' de patrujo, kiu falos
Sen nova apogilo – rajtojn donu!
Nur por vi estas el la leĝoj floro,
La dornojn fetis vi al la popolo,
Donu ĉi tien iom da petalo,
Reprenu la duonon de dornaro!

Ankoraŭ petas la popol' – nun donu!
Ĉu vi ne scias, kiel furioza
Estas popol' prenanta, ne petanta?
Ĉu vi ne aŭdis pri Georgo Dózsa?
Lin sur fertrono fajra vi bruligis,
Sed la spiriton fajro ne nuligis.
Li estas fajro mem! Vin bone gardu,
Ke kontraŭ vi ĉi fajro ne reardu!

Tradukis: Imre Szabó

* La 1-a kaj 6-a strofoj – kun etaj modifoj – estas tradukitaj de Kalocsay

---

La Armeo Transilvania**

Ĉu ni ne venkus? Ja Bem nin direktas,
Malnova ĉampiono de l' liber'!
Li nin kun lumo de la venĝo estras,
Hero' de Ostrolęka, sanga stel'.

Li iras jen, la ĉefo grizharara,
Barbego lia flagras – blanka flag',
Kiel simbol' de paco, aktuala
Post fin' triumfa, en la venko-tag'.

Ni, filoj de patri' – junularo
Postiras la grizharulon estran,
Kiel senbridaj ondoj de la maro
veteron sekvas, ventan, tempestan.

El du nacioj anoj unuiĝas,
Kaj kiaj du! Hungaro kaj polo!
Ĉu pli potenca sort' ie troviĝas
ol ni, se nin ligas sama volo?

Celadoj niaj tute ja kongruas:
La kunan ĉenon rompi volantaj,
Ke ni ĝin rompos, Patrio, ni juras,
Je viaj ruĝaj vundoj sanktaj!

Rabisto kronhava, direktu bandon
Kontraŭ nin, aĉajn ulojn el viaj,
Ni al infero tuj konstruos ponton
El la kadavroj sangaj iliaj.

Ĉu ni ne venkus? Ja Bem nin direktas,
Malnova ĉampiono de l' liber'!
Li nin kun lumo de la venĝo estras,
Hero' de Ostrolęka, sanga stel'.

Tradukis: Márton Fejes

** Transilvanio: regiono interne de Karpatoj, iam parto de Hungario. Józef Bem (1794-1850), pola artileria oficiro, revoluciulo kaj internaciisto.

PANORAMO

Pál Losonczi akceptas la turkan ĉefministron Bülend Ulusu

Bulgara-hungara amikeco: Todor Ĵivkov kaj János Kádár

Muldoon, nov-zelanda kaj Lázár, hungara ĉefministroj



Kontaktoj kun multaj landoj

Hungario estas malgranda lando, tamen ĝi havas tre aktivan eksteran politikon. La hungara popolo vartas amikajn rilatojn kun landoj najbaraj kaj foraj egale. Tiuj bonaj rilatoj ne malofte manifestiĝas per la vizito de altrangaj politikistoj al Hungario. Ekzemple, en majo kaj junio de 1983 estis gasto de Budapeŝto Robert David *Muldoon,* ĉefministro de Nov-Zelando, Todor *Ĵivkov,* ĉefsekretario de la CK de Bulgara Komunista Partio, kaj fine de junio Bülend *Ulusu,* ĉefministro de Turkio. La intertraktadoj en ĉiuj tri kazoj montriĝis tre fruktodonaj, kaj la sukceso pruvis, ke malgraŭ la malfacilaj internaciaj cirkonstancoj restas ebloj por kunlaboro eĉ inter landoj, apartenantaj al malsamaj socisistemoj.

Sándor Weöres distingita

Sándor *Weöres,* unu el la plej elstaraj vivantaj hungaraj poetoj (vd. en n-ro 83/2, p. 51.) okaze de sia sepdekjariĝo estis distingita per la Standarda Ordeno de Hungara Popolrespubliko. Sándor Weöres partoprenas en la literatura vivo ekde sia 14-a jaro; li kreis ankaŭ tre altkvalitan porinfanan poezion (vidu en la volumo «Hundbazaro»), kaj li speciale elstaras sur traduka kampo — li peris al la hungaraj legantoj amason da eksterlandaj poemoj (ankaŭ ĉinajn, hindajn, japanajn).

PANORAMO

Rock-ensemblo en Budapeŝto

Lastatempe tre ofte gastas en Budapeŝto mondkonataj ensembloj de amuza muziko. Post *Santana* la hungaraj gejunuloj povis aŭdi kaj vidi la koncerton de la angla ensemblo *Smokie* en la Sporthalo Budapest (Kongresejo de la 68a UK). Kvankam la prezo de la biletoj ne estis malalta, tamen la Sporthalo pleniĝis de entuziasmaj gejunuloj.

Entuziasma knabino dum la koncerto

Somera ekzotikaĵo

La Budapeŝta publiko jam de jaroj alkutimiĝis ricevi dum la somero ian ekzotikan amuzan programon. Dum la antaŭaj someroj gastrolis en Budapeŝto pluraj Afrikaj kaj Sud-Amerikaj danc-ensembloj: ĉi-somere nia ĉefurbo akceptis Azian trupon. Dancensemblo el Filipinoj prezentis programon kun la titolo «Pacifikaj perloj», kiu interese kombinas elementojn de la praa Pacifika folkloro kun atributoj de la okcidentaj revu-teatroj.

Pál Losonczi (maldekstre) transdonas la distingon al Sándor Weöres



„Smokie" en Budapeŝto

„Pacifikaj perloj"



ELEKTU TAKSION KUN ESPERANTA ŜILDO!

FöTaxi – Hertz

BUDAPEST H.1073
KERTÉSZ U. 24.
HUNGARY
TEL.: 116-116
TX.: 22-6222
AIRPORT FERIHEGY



REVUO DE REVUOJ

Ne ĉiam venas–ravas–incitas nova temaro en nia revuaro. Foje mi jam konfesis je amika demando: kelkokaze vere malfacilas kribri artikolojn, kiuj vekos apartan intereson ĉe nia publiko, kiu estas ja internacie multtavola, sekve ankaŭ multa-vola... Tamen – sen doni pri la tema selektado ian arbitre teksitan principaron miaflanke – estas facile komprenebla motivo iel fokusigi la temojn, multloke traktitajn.

„Duafoje teatra festivalo en Budapeŝto" kriis titolo surkovrile de ESPERANTO (5) sub scenejaj fotoj – kvazaŭ kolektiva titolo por daŭre aperintaj artikoloj pri tiu delikata printempa menuo (feliĉe, grandparte prezentota dum la Universala Kongreso). Pri la plua enhavo de tiu ĉi revu-numero eblas iom torde citi la titolon de nova Waringhien-volumo: *„...kaj la ceter' – nur raporto"*; ja, pri agado de UEA, kun monda horizonto, kaj multe-multe pli bunta ol ŝajnigas la modesta titolo: *Estrara Raporto.*

Se apud ĝi la artikolo de D. *Masterman* elstarigis la teatran artecon de la tutsemajna programo, en HEROLDO (7) Roma *Thorsen* aprecis la emociajn efektojn de la travivitaj teatraj vesperoj. Kronis ilin unika recitalo de aktorino Gabi *Jobba* pri Petőfi, kiu aparte emociigis post dumtaga vizito al lia historie famiĝinta pilgrimloko – laŭ rememoro de la aŭtorino.

Tuj ni menciu la apude metitan grandan artikolon de Tibor *Sekelj* pri alia „unikaĵo" (iomete jam konata al niaj legantoj), t.e. nacilingva, elegante aspekta revuo pri kaj por Eo, aperanta jam de 23 jaroj! VILÁG ÉS NYELV (Mondo kaj Lingvo) „laboras" kaj surstrate, kaj penetrante en gravajn instancojn; disputas kaj kampanjas, agitas kaj – ofte grandsukcese konvinkas eminentulojn, eĉ ligas ilin al Eo. La detala superrigardo de tiu fenomeno helpe de ĝia ĉefredaktoro Imre *Szenes,* profesia ĵurnalisto, igis mediti la aŭtoron, Sekelj, pri la movada bezono kaj publika rolo de altkvalita, simila periodaĵo en landoj de forta movado: kiu lando sekvos? – li demandas fine, per forte instiga akcento. Nepre leginda artikolo, inter aliaj de movadaj gvidantoj!

Nun Perla *Martinelli,* redaktorino de LITERATURA FOIRO (78) entuziasme dediĉis plurajn artikolojn al la „spektaklo" de la Budapeŝta festivalo. Inter ili ŝi publikigas intervjuon kun G. Jobba, prezentante la enlande faman aktorinon kiel E-an interpretiston, kreanton de malŝablona kaj altsukcesa propra programo. Kune ni esperu, ke venonte eblos prezenti pli da *originalaj* teatraĵoj, kies nivelon manifestu la ĝuo de la publiko! Koncerne plezuron – cetere – la leganto tuj ricevis fakte eksterordinaran: novelon, spritan kaj mokan, vere raraĵon – de Kálmán *Kalocsay* postlasitan. Evidentiĝis jam laŭ pluraj publikitaĵoj, ke ankoraŭ kaŝiĝas diversaj atentindaj verkoj de Kalocsay, kies eldonon nia publiko atendas.

Se paroli pri legindaj noveloj, la printempo produktis abundan rikolton jam antaŭ la somero. KULTURAJ KAJERO (2) donis eminentan tradukon de *Daudet* (dode), far A. *Ribot.* Ankaŭ FONTO prezentis en la printempaj numeroj plurajn, kiuj meritus mencion. Liston doni ne estus ĝentile, sed ne laŭdi estus des pli malĝentile: „Amafero" de J.H. *Sullivan* montras progreson el psika-drameca vidpunkto, kaj stile senpompan densigon impresdonan. Ĉar novelo ne estas simpla rakonto, nek nura reverkado de proprai aventuroj, la progreso de tiu literatura ĝenro en E-ujo ne glate glitas. Necesas al ĝi orientita talento kaj severa praktikado krom elstara, ne ĉiutaga lingva kapablo. Tra la gazetoj ofte enuigas pecoj kun plateca, sensuka stilo, kriaj mankoj de fortika esprimkapablo per trafe komponitaj vortkonstruoj. Eble ne ĉiu ekverkanto prenos la konsilon, jam dum skribado elprovi sian tekston per laŭtlegado, kvazaŭ antaŭ publiko. Tiam la malglataĵoj stumbligos la voĉon, la trolongaj aŭ balbutigaj frazoj ĝene prezentos kaj petkrios por bonvenaj korektoj – samkiel knaraj pordoj, ankaŭ krakaj vortoj atendas ŝmiron...

Malsupreniri, eĉ fali de sia antaŭa nivelo povas foje ankaŭ gazeto, precipe dum kaj pro internaj perturboj antaŭ la gvidproblemo: ĉu pro- aŭ regresi, nur paŝi aŭ alkuri en siaj temoj? Plendinde kaj bedaŭre sinkigas malprudenta balanciĝado la iam renoman *sennacian gazeton.* Koncentriĝi anstataŭ pri imperiismaj fenomenoj, danĝerigantaj la homaron, pli kaj pli da artikoloj ludas per groteska teoriumado: oni „pruvas" la rajton de privata proprieto je kulero, binoklo aŭ kiu ajn, lerte egaligante kaj neniel distingante aĵojn personajn disde produktiloj. Kontraŭ kiaspeca socialisma tendenco estas tiel kuraĝe protektindaj kuirejaj iloj? – oni demandas sin, sed la emfazita „eduka agado" de la gazeto nove-denove pli perturbas. Aliaj artikolantoj ree konsideras la popolojn ne maturaj, se iliajn elpensaĵojn oni ne akceptas. Nur tre sporade legeblas tie spuroj de racia pensmaniero, kompreno pri realaj mondaj cirkonstancoj, inklino malproksimiĝi de la arbitra, sintruda ideo-fabrikado kaj marŝi sur la tero, observante la vivgravajn postulojn kaj verajn interesojn de la sociaj klasoj kaj tavoloj.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

Sukcesa esplorado pri akvo

Antaŭ niaj legantoj estas jam sufiĉe konate, kiel ampleksaj estas la hidrologiaj agadoj en Hungario. Por sufiĉe kompleksa ekzamenado de la hidrologiaj fenomenoj oni bezonas multlflankajn kaj komplikajn agadojn, ĉar nur sur vasta bazo eblas difini la farendojn (kiuj estas ĝenerale same plurrilataj). Por demonstri al la legantoj la striktan interligon de la diversaj hidrologiaj agadoj, nun ni turnas la atenton al la akvoesploro, putborado kaj akvoelpreno. En Hungario tiujn taskojn plenumas la Entrepreno por Akvoesploro kaj Borado.

Komence indas mencii – kion jam multa fakuloj rimarkis –, ke la ekspertoj kaj ceteraj laboruloj de tiu entrepreno tre ofte kaj kun alta respekto aludas al la pioniraj antaŭuloj de tiu metio, al la grandaj tradicioj de sia entrepreno. Kompreneble oni ĉie alte taksas tiun konduton, ĉar ĝi implicas profundan sindonon al la profesio: pro tio kutime kreskas la fido rilate la laboron de la entrepreno.

En tiuj tradicioj alte staras – kiel plej respektata modelo – la pionira inĝeniero, *Vilmos Zsigmondy* (ĵigmondi), eminenta geologo, kiu inaŭguris la profundboradojn en la lando. Kiel fidindan scienculon oni komisiis lin – meze de la pasinta jarcento – fari profundan borsondaĵon en la Budapeŝta insulo Margareta por ricevi termoakvon. Malsanuloj de reŭmatismo kaj banejgastoj ĝuas ĝin de tiam. La varmega akvo de lia preskaŭ mil metrojn profunda borsondaĵo sur la nuna Placo de Herooj (1868-78) provizas la Banejon Szechenyi – apud kiu videblas lia bustomonumento. Per tiuj boradoj komenciĝis la moderna putoborado en Hungario.

La posteuloj de la iamaj putboristoj zorgas nuntempe pri gravaj taskoj koncerne la hidrologian laboron. Ili devas grave kontribui al la kontentigo de la kreskantaj akvobezonoj flanke de la ekonomio kaj la loĝantaro. Tiucele la entrepreno laboras en multaj rilatoj, i. a. per tiaj agadoj:

– Hidrogeologia preparo, projektado kaj plenumo de borsondaĵoj;

– Borsondaĵoj kaj ekspluato ĝis profundo de 2500 m, por trinkakvo, irigacio, industria provizo, termoakvo;

– Projekto kaj borado de granddiametraj putoj ĝis profundo de 300 m, kun speciala teknologio;



– Inĝeniergeologiaj kaj grundmekanikaj borsondaĵoj, tiucelaj laboratoriaj analizoj, ekspertado;

– Ekzamenado, riparado kaj kontraŭkoroda ŝirmado de boritaj putoj, per geofizikaj, hidrodinamikaj kaj akvokemiaj instrumentoj;

– Regula kontrolado kaj ekzamenado de la parametroj ĉe funkciantaj putoj per memkonstruitaj instrumentoj, puto-priservado;

– Konstruo de put-supraĵoj; minoj por pumpilejoj kaj rezervujoj;

– Specialaj filtr-aparatoj (gluita gruzfiltrilo) kaj putmuntaĵoj (riglilo) – konstruado kaj muntado;

– Fabrikado de put-ekzamenaj instrumentoj (reometro).

La listo de tiuj agadoj jam klarigas la intencon de la entrepreno laŭ la principoj de Zsigmondy: konstanta modernigo de la profundbora teknologio ĉe akvoesploroj, kaj kompleksa realigo de la koneksaj «flanklaboroj». Laŭ iniciato de la entrepreno nun ŝtata normo disponas pri la deviga geofizika karotaĵo (elektra profilmezurado) ĉe ĉiu akvoesplora profunda borsondaĵo!

En la plej grava problemo de la put-konstruado, nome por elekti la utiligindan akvohavan tavolon, oni sukcese realigis kunlaboron de geologo, geofizikisto kaj boristo-inĝeniero. Tiamaniere la filtrigo iĝis multe pli preciza, sekve kreskis la ekspluatata akvokvanto. Estis disvolvita ankaŭ taŭga kemia analizado de la surfacaj kaj subteraj akvoj; lastatempe jam regulmaniere okazas la hidrodinamikaj mezuradoj de la putoj, koncerne la karakterizajn parametrojn. Per tio eblas ricevi utilajn indikojn por pli



precize determini la ŝanĝiĝadon de la tavol-energio.

La entrepreno organizis regulan priservadon de la termoakvoputoj, kaj okupiĝos estonte ankaŭ pri konstanta kontrolado kaj teknika prizorgado de la funkciantaj termoakvaj putoj. Krome, tiu servado ebligos sisteme observi la latentan, ne-utiligatan produktokapablon de la termoakvaj putoj, helpante ties sciencan prilaboradon.

Kiucele estas la putoj konstruataj? Trarigardo de la entreprena statistiko pruvas, ke rondcifere la duono de la putoj servas la agrikulturon, dum la alia duono donas trinkakvon kaj industrian akvon. La termoakvaj putoj, boritaj fare de la entrepreno, plejparte liveras varman akvon al loĝantoj de vilaĝoj kaj urboj, kiu multloke estas utiligata por urba centra akvohejtado, varmakvaj plaĝoj kaj subvitraj kultivadoj de kooperativoj. Pluraj novaj kuracbanejoj establiĝas sur tiuj termoakvaj putoj (Bük, Sarvar k.a.)

Depost kvaronjarcento ankaŭ en Mongolio laboras fakuloj de tiu multsperta entrepreno: grava sukceso, pli ol 500 akvodonaj putoj estiĝis sekve de ilia agado. Tio estis grava kontribuo al la solvado de la ega akvoproblemo en Mongolio. Aldone la hungaraj fakuloj edukis lokajn fakulojn por akvoesplorado kaj putborado, krome apogis la establon de mongola entrepreno por putborado. Similajn taskojn plenumis la ekspertoj de la entrepreno ankaŭ en multaj aliaj, precipe evoluantaj landoj. En Gvineo, Malio, Sirio, Jemeno, Maroko, ankaŭ en Jugoslavio multe kaj longe laboris la entrepreno por kontentigi la lokajn akvobezonojn per esplorado kaj putkonstruado. Tra la mondo montriĝas tiucele kreskanta bezono, kiu necesigas daŭre modernigi la metodojn kaj de la akvoesploro, kaj de la bora teknologio, de la putkonstruado. Ĉio ĉi bezonas kompreneble bone ekipitajn teamojn kaj akvokemiajn laboratoriojn por la putanalizo.

Fine ni menciu interesan flankon de la entreprena agado. Daŭre kreskas ĝia produktado kaj komercado per kuracakvoj (ankaŭ per mineralakvoj), kiujn la entrepreno enboteligas kaj en pliiĝanta kvanto ankaŭ eksportas. Nuntempe oni pli kaj pli inklinas konsumi tiujn tute naturajn sanigilojn, ne mirinde do, ke la pretendoj por botelita kuracakvo nun de jaro al jaro kreskas.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Tra muzeoj de Budapeŝto 2.

Multaj asertas, ke la nepre vizitinda centro de Budapeŝto estas la *Placo de Herooj* (Hősök tere), tiu harmonie komponita ensemblo de monumentoj kaj arkitekturaĵoj apud la vasta Urba Parko. En akso de la tien kondukanta granda avenuo staras altega kolono, je memoro de la miljara Hungarlando (1896), sur la bazo ĝin ĉirkaŭas rajdstatuoj de elstaraj regantoj, de la unua reĝo, *Stefano* (1000), ĝis la unua respublika estro, *Lajos Kossuth* (1849). Flanke de tiu impona vidaĵo staras la klasikstila *Muzeo de Belartoj,* sur kies frontono triumfas Apolono inter grupo de kentaŭroj, fidela kopio desur la Zeŭs-templo en Olimpio. Tra majesta interno de stilo renesanca oni venas al la grandega kolekto de Eŭropa pikturo el ĉiuj periodoj prezentanta multajn ĉefverkojn. Aparte rimarkinda estas la abundo de pentraĵoj de la *grandaj hispanaj majstroj* (Zurbaran, Murillo, Velazques, El Greco, Goya k.a.) – kiun oni konsideras la plej granda tia trezoro ekster Hispanio! Apud la greka-romia kaj aliaj ampleksaj ekspozicioj ni atentigas pri la furora „op-art" ekspozicio de *Victor Vasarely,* pioniro de optike efikantaj eksterordinaraj kolorigoj.

Malantaŭ la monumentoj jam atendas la *Urba Parko,* la romantika lageto, kiu ĉirkaŭas kuriozan insuleton kun „subĉiela muzeo" de arkitektur-historio en Hungarlando: majstre kunigitaj konstruaĵoj de romaniko ĝis rokoko, kopiitaj el diversaj landpartoj. Apud mezepoka „fortikaĵo" pompa baroka palaco (kun multaj aliaj stilelementoj kunigata) prezentas multajn interesante vivplenajn ekspoziciojn pri la historio de la bestobredado. En tiu *Muzeo de Agrikulturo* oni prave volas vidi ion – ni estas ja en Hungario! – pri la hungara ĉevalbredado; tamen ne postrestas ankaŭ la aliaj hejmigitaj bestoj, eĉ la altinteresa sekcio de la ĉasado, kun multaj rekordaj trofeoj de la abundaj Hungarlandaj ĉasteritorioj.

Etnografia Muzeo (Foto de Z: Fejér)

Promenante en la Urba Parko inter maljunaj arbegoj kaj skulptaĵoj, florriĉa botanika ekspoziciejo kaj romantikaj „infankasteloj" – se ne mencii la grandan *Cirkon* kaj *Distro-Parkon* kun la diversaj karuseloj kaj plej kuriozaj maŝin-ludiloj – oni facile trovas pluan muzeon. La *Trafikmuzeo* demonstras la evoluon de la fervojoj kaj de la fervoja trafiko, veraj historioj de la homa genio, ĉiam instigata de la premaj bezonoj. Sed tiun muzeon ni mencias nun precipe pro la tie aranĝata *Ekspozicio de Esperanto-poŝtmarkoj,* kiu estas koneksa parto de nia Kongreso.

Ankoraŭ en la ĝis nun priskribita muzeo-kvartalo troviĝas la *Muzeo de Orient-Azia Arto „Hopp Ferenc"* (sur la avenuo Népköztarsaság útja 103.). Jen

Placo de herooj (Foto de Z. Fejér)

neofte troveblaj admirindaj artaĵoj, el kiuj la muzeo nuntempe ekspozicias aparte el Hindujo kaj Javo siajn plej belajn kaj kuriozajn folklorajn kaj metiajn pecojn.

Veturante al la urbocentro, ĉu per aŭtobuso, ĉu per la 80-jara, tamen ne aĝa subtera fervojo (Metro 1.), post minutoj estos atingita tre interesa 3-etaĝa kruciĝejo de tri Metro-linioj, plena de diversaj signaj koloroj (Deák tér). Se interesas vin tiu speciala „veturilo" de la modernaj metropoloj, faru kelkpaŝan ekskurson sen atingi la surfacan trotuaron. Vi trovos etan subteran *Muzeon de Subteraj Fervojoj,* en eksa tunelo de la malnova subtera fervojo, kompreneble kun originalaj veturiloj. Kaj jam delonge la vizitantoj ricevas tie ankaŭ Esperantlingvan klarigan gvidlibron – do neniu konsideru perdita la tie pasigitan kvaronhoron.

Cetere indas koni, ke preter la tie kondukanta bulvardo (kie trafikas ankaŭ tramo al la Nacia Muzeo kaj plu al Danubo kaj Gellért-monto) estis iam la *limo kaj murego* de la mezepoka urbo Peŝt, kelkloke videbla eĉ nun.

De la jam menciita triobla stacio de Metro (Deák tér) necesas veturi nur unu etapon per „ruĝa" linio, kaj oni trovas sin jam ĉe la Parlamento, sur la *placo Kossuth,* alia belega centro de la ĉefurbo. La grandiozan konstruaĵon – plej ampleksan en meza Eŭropo – kvazaŭ ĉirkaŭprenas statuoj de granduloj. Apud ĝia suda flanko la elstara moderna poeto Attila *Jòzsef* rigardas la riveron meditante, kiel en sia fama poemo „Ĉe Danubo", kiu poemo enkondukos la kongresan Nacian Vesperon; sur la granda placo unuflanke rajdas *Rákóczi la Dua,* aliflanke *Kossuth* staras ĉirkaŭata de revoluciemaj popolanoj. Norde de tiuj naciaj herooj apogas sin sur sia bastono Mihály *Károlyi,* ĉefa estro de la revolucio en 1918, la unua respublika prezidanto. La vespera iluminado havigas aparte profundajn impresojn pri tiuj monumentoj kaj pri la apudaj palacoj.

Unu el ili donas nun lokon por la *Etnografia Muzeo:* la parte klasikisma stilo kaj la multaj statuoj donas eksterordinaran aspekton al la grandioza konstruaĵo, kies ŝtuparejo estas mem ri-

gardinda artaĵo. Apud la folkloraj ekspozicioj – hungaraj kaj eksterlandaj, ĝis Oceanio – dum la nunaj monatoj videblas altinteresa *fotoekspozicio* pri kutimoj, ceremonioj kaj vivmanieroj de la hungaraj hebreoj. La fotoartisto T. *Fényer* kapablis komponi tre valorajn, intime profundajn kaj impresdonajn bildojn pri festoj kaj ĉiutagoj, iamaj kaj nuntempaj.

La Budapeŝton kvazaŭ kronantan Burgpalacon oni ne povas nur unufoje viziti. Pri ĝia mezepoka parto ni okupiĝis en la unua parto de tiu ĉi artikolo. La longe daŭranta postmilita restarigo de la ruiniĝinta reĝa palaco celis krei inter la tradiciaj muroj – analoge al la Luvro en Parizo – muzean komplekson, helpe de modernaj teknikaj manieroj. Ankoraŭ ne finiĝis la instalo de la

La klasikisma konstruaĵo de Belarta Muzeo (Foto de Z. Fejér)

Attila József – ĉe Danubo (Foto de Z. Fejér)

Nacia Biblioteko en la okcidenta palaco-flanko. En la norda parto ricevis lokon la *Muzeo de la Hungara Laborista-movado;* la mezan parton – sub la kupolo, servanta ankaŭ por elvidejo – okupas la *Nacia Galerio.* La plej ampleksa kolekto de la Hungarlanda arto prezentas nun precipe el historiaj periodoj: *gotikajn* lignoskulptaĵojn kaj bildojn el la 14-15a jarcentoj kaj pli malfruajn triptikojn, artaĵojn, *renesancajn kaj barokajn.* Tamen restas ĝia ĉefa celo: montri la grandajn majstrojn de la lastaj tempoj, i.a. M. *Munkácsy* kaj L. *Paál* kun la hungara impresionisma skolo, kaj la eminentajn skulptistojn de la pasinta jarcento. Ne facile forlaseblaj delikataĵoj...

Por ne forgesi: ĉiuj muzeoj – ankaŭ la aliaj ne-menciitaj – akceptas viziton ĉiutage inter la horoj 10–18 (escepte lundon). *Por kongresanoj senpage.*

Ervin *Fenyvesi*

ORIGINALA POEZIO

Aldo de' Giorgi

Eŭtanazio

Neniam ajn okuloj homaj
rigardis kaj rigardos min denove
tiel intense,
tiel rezignacie kaj riproĉe
samtempe,
kiel en tiu hor' terura
kaj neforgesebla,
kiam mi vin mortigis,
Cocky,
kompano gaja kaj fidela,
detrua kaj konsola,
de miaj feliĉaj vivoeroj
kaj de l' koŝmaraj.
Vi kunvivis kaj akceptis,
kompreneme,
la idilion familian
kaj la momentojn de l' despero,
kaj viaj okuloj dankis
jen la dorlotojn
de la tenermomentoj
jen la kolereksplodojn
de l' temoj postperfidaj.
Vi dividis la ĝojojn
kaj la solecon,
senboje kaj senplende,
ĝis la adiaŭo lasta,
kiun vi komprenis kaj akceptis.
Sed restos en memoro poreterne,
kiel spado en la ripoj,
tiuj viaj superhomaj,
dankaj kaj akuzaj,
okuloj.

John I. Francis

Esperartisto

Drivante ĉiam sur nubero,
neniam atingonte la lazuron
mergiĝi en la sensubstancan puron,
neniam en la tero
kun varma vivvulgaro
radikiĝonte

estas sincere
sinmurde.

Imre Szabó

Ni vadantaj

Ni vadantaj
tra la lago estingita
vespertoj flugpendas
brilas en ili la ostoj
Ni vadantaj
la frunto memoras
per sunoj varmaj
Ni vadantaj
la koro rosas
per aŭroroj infanokulaj
ni vadantaj
la manoj portas
subhaŭte la karesojn
ni vadantaj
perdis la okulojn
de aŭroroj
kaj ni vadantaj
senkoloraj insektoj
en sukcenpensoj katenitaj
ni pensas, ke ni vadas.

Ludmila Jevsejeva

Printempa febro

Freŝlavita paŝas marto
laŭ senneĝaj stratoj.
Tutan nokton, sur tegmentoj,
serenadas katoj.
Elokvente ĉirpas birdoj
en ĉiela halo.
Ĉiu bubo, en lernejo,
revas pri futbalo.
Eĉ pedanta instruisto,
magra, kiel kulo,
zumas gajan melodion
ĉe la klas-tabulo.
Estas klare, ke neeblas
dum printempa febro,
sin okupi pri fiziko,
lingvoj kaj algebro.

Julius Balbin

Homo Sapiens*

a
ma
mam
mamo

o
mo
mon
mono

u
mu
mur
muro

e
me
mem
memo

i
mi
mil
milito
milionito
miliardito
finito

* (latine: saĝa homo) la sola postvivinta specio de la genro homo kaj de ties primata familio, hominidae

S. Elgo

Trajnoj

Tiuj homoj, kiuj pasas,
Tiuj trajnoj, kiuj fuĝas...
Kaje sidas, kiu lacas
Dum vespero vane ruĝas.

BUDAPEŜTO VIN BRAKUMAS!

(Salutkanto al la partoprenantoj de la 68a UK)

Teksto - muziko:
Imre SZABÓ
László ZSOLDOS



ĜIS REVIDO...

Teksto - muziko:
Imre Szabó
László Zsoldos



András Sugár

Pensoj pri la lingvaj imperiismo

La vorto „barbaro" devenas el antikva greka onomatopeo. La helenoj nomis „bar-bar/os/" tiun, kiu balbutante parolis ilian idiomon. La slavoj similkaŭze nomis ĉiun germanon „nemec", t.e. „mutulo", ĉar fakte estas muta tiu, kiu ne kapablas paroli „homlingve".

Nuntempe la parolantoj de „mondlingvoj" strange kaj ne egalmaniere traktas la homojn, kiuj misuzas ilian gepatran. La anglalingvanoj alkutimiĝis al tio, ke tutmonde troviĝas grandnombre fremduloj, bone-malbone ellernintaj la anglan. Tial ili toleras, se la eksterlandano malĝuste konjugacias, misprononcas la malfacilajn anglajn vortojn, malkontentige uzas la esprimojn. La francoj ĝenerale konsideras privata ofendo aŭ almenaŭ malĝentileco, se fremdulo erare parolas la lingvon de Racine kaj Voltaire. En Parizo oni ofte eĉ sentas sin rajtigita por humiligi la eksterlandanon, se tiu ne sufiĉe korekte parolas france.

Foje mi alvenis en Parizo, kaj evidentiĝis, ke mia valizo estas perdita. En la flughaveno oni faris protokolon, kutiman en similaj kazoj. (Post dekok tagoj en Budapeŝto mi ricevis de Air France la kofron dio-scias-kie trovitan.) Sed mi havis tre densan programon en Francio, do mi devis aĉeti subvestojn, ŝtrumpetojn kaj aliajn necesaĵojn. Miaj gastigantoj klarigis al mi, ke mi devas repagigi la kostojn (tre modestajn, maksimume 60 US-dolarojn) kontraŭ montritaj fakturoj ĉe la ĉefoficejo de Air France en la avenuo Champs Elisées, centre de Parizo.

Mi flue parolas france, sed kun multaj eraroj. Ekzemple pri la genroj. Kial okazis ekzemple, ke la in-genra „ars" de la latina en la franca iĝis vir-genra „art"? Oni ĉi tie ne devas serĉi logikon. Sed se mi faras tiaspecan eraron, ĉiu klaĉema pordistino de Parizo tuj vidos en mi aĉan, naŭzan, insideman kaj stultan fremdlandanon.

Tio baldaŭ evidentiĝis en la informoficejo de la granda franca flugkompanio, kie la oficisto kun ioma supereco korektis erarojn de mia parolo kaj kun deca aristokrateska orgojlo sendis min al Madame X. Mi emetis rifuzi la superecon, kaj demandi lin: ĉu li parolas angle, ruse, hungare ktp., sed tio estintus sensenca, ja por li la francoj kaj nur la francoj estas veraj posedantoj de la kulturo, la aliaj nacioj estas barbaroj. Sur lia vizaĝo eblis vidi la troan memfidon kaj ŝovinismon. Mi erare parolas france, sekve *mi estas trompanto, eĉ trompisto kaj ĉarlatano, kiu intence malaperigas valizojn por priŝteli la gloran nacion Francan.*

Vidinte tion, mi decidis: traktante kun Madame X mem esti la fruktuzanto de la lingva imperiismo, do havi superecon psikan. La rimedo simplas: ĉi tiu damo devas scii la anglan, temas ja pri oficistino de flugkompanio, sed certe ŝi parolas ĝin tiel malbone, kiel la plejmulto de ŝiaj samlandanoj. Se mi ekparolus hungare, eĉ unusola mia vorto ne estus komprenata, sed tiu ĉi alloga varianto de agado aŭtomate forfalis. Tiam do: unu, du, ek! Oni komencu la fruktuzadon de la supereca pozicio, ĉar angle – pardonu min – mi parolas iom bone.

Madame X tronsidis ĉe skribotablego, sur ŝia vizaĝo videblis la idioteska stulteco kaj la orgojlo, kiam ŝi rigardis al la vestaĵo, je kiu tuj estis divenebla mia eksterlandeco. Sur ŝia tablo staris tabuleto kun surskribo „REKOMPENCOJ". Mi memfide ekparolis – kompreneble – anglalingve kaj kun tiom da rigido, kun kiom mi povis, metante sur ŝian tablon la fakturojn:

– Kial mia valizo estis forŝtelita? Tuj redonu miajn aĵojn! Via traktado estas konsterna!

Madame X ekpardonpetis tre modeste – per terura angla lingvo *– ŝi rakontis, ke, bedaŭrinde, foje-foje okazadas malapero de valizo, sed la bagaĝo tutcerte estos trovita.*

– It will certainly be find *– ŝi diris anstataŭ* found *(temas pri verbo malregula).*

– Horrible! (t.e. terure) – ekkriis mi angle. – Ĉi tie oni ne scias eĉ konjugacii! Hontu! Tia firmao ne entreprenu transportadon, kaj ne estas estas surprize, ke ĉi tie oni *ŝtelas eĉ kofrojn!*

Por mia plej granda miro Madame X tuj humiliĝis, pardonpete vicigis ĉiujn senkulpigojn, evidentajn en similaj kazoj, senhezite ŝi ĝiris la necesan sumon, kaj ne sciis, kiel ŝi povus gajni mian pardonon. Kun abomeno mi korektis ĉiun ŝian eraron en la angla parolo, kio igis ŝin je humila sen-

kaj malplivaloreco

Laŭ la leĝoj de la homa psiko, balbutanta kulpiĝo kaj ŝi furis pli bone ellerni la anglan lingvon.

Mia franca akompananto – homo multe vidinta, kiu mem parolas angle – foririnte diris al mi:

– Oldulo, se ĉi tie vi parolintus france, Madame X detruintus vin kaj finance kaj morale, vi ne ricevintus unu solan groŝon kaj fine vi mem devintus senkulpiĝi. Vi starintus antaŭ ŝi, kvazaŭ negro antaŭ la laborkontrolisto en plantejo.

Ni bonhumore ridis, kaj poste – iom pli triste – mi tiris la psikologiajn konkludojn de la okazo. naciminoritatano aŭ eksterlandano, do „bar-bar-o", kun iu afero en oficejo tuj iĝos duonhomo, pario, kiam la oficisto ekhavos la pozicion de lingva supereco. En aliaj kazoj – ekzemple dum komercaj traktadoj – denaskaj parolantoj de „mondlingvoj" havas aŭtomate pli favorajn poziciojn, ja ili kun la patrina lakto sucis en sin la scion de la angla aŭ eble de la franca lingvoj. La Afrikan studenton, malbone parolantan hungare, oni ĉe ni ofte emas ci-diri, kiel etan infanon. Povas esti, ke ankaŭ ni ne estas anĝeloj, kvankam ni multe diferencas disde la Parizaj Napoleonetoj. Portugala doganisto, ekzemple, impertinentis al mi, ĉar mi – volanta esti ĝentila – ekprovis portugaleske lispi miajn frazojn, elpensitajn hispanlingve. Li diris: „En Afriko ĉiu preto boçal *(arbara negro) pli bele parolas la lingvon de Camões! " Mi devis obĵeti: „Kaj vi kiom da lingvoj komprenas? " La ĝentlemano kun eta liphararo iom pli modeste respondis: „Mi iomete scias la francan." Tiam mi komencis instrui lin france, kaj li tuj malorgojliĝis. Mi informis lin, ke la poezion de la granda Camões ekster la luzida mondo konas nur la literaturologoj, mi mem parolas ĉirkaŭ dek lingvojn, kaj preferus, se li edukus siajn infanojn kaj ne min. La lingva imperiismo tuj malaperis...*

La afabla leganto certe divenis, pri kio temas. La gentoj de la mondo devus komuniki en tia – internacia – lingvo, kiu estas ekskluziva proprafo de neniu popolo, malantaŭ kiu staras neniu granda (aŭ meza) potenco, kiu al neniu donas malmerititan avantaĝon aŭ malavantaĝon.

Tia lingvo ekzistas.

La surdmutulo

Mem la astronomo dungis la surdmutulon, ankoraŭ printempe. Li trankviligis sian edzinon: ne timu, la mutulo *krom tio* estas normala, nur nenion li aŭdas. Kaj ne parolas. Sed rigardante la buŝojn li komprenas ĉion.

La virino komence timis lin. La surdmutulo flegis la ĝardenon de la vilao; li estis tridekjara, larĝŝultra, sunbrunigita. Dumtage li silente laboradis en la ĝardeno, forportis la balaaĵon, kaj se oni donis al li papereton, do li ankaŭ alportis varojn el la vendejo. Li loĝis sub la vilao, en la subteretaĝo.

La astronomo tuttage sidadis en sia observatorio kaj se la vetero taŭgis, do li pasigis tie ankaŭ la noktojn. La virino – ŝi havis tiam tridek kvin jarojn – enuis. Malofte ŝi vidis sian edzon, kaj eĉ se li revenis, li parolis nur pri foraj galaksioj, supernov-steloj. Kelkfoje li menciis blankajn aŭ ruĝajn, eĉ duoblajn stelojn. La edzino silentis. Oni devas pagi por la bonstato, komforto, por ĉio ĉi. Almenaŭ tiel, aŭskultante lin.

Iuvespere sola ŝi sidis, la edzo la nokton denove pasigis kelkajn lumjarojn for, en iu galaksio. Ŝi aŭskultis muzikon; kiam la disko eksilentis, ŝi ekstaris por turni ĝin aliflanken. Sed ŝi ektimis... Sur la sojlo de la ĉambro staris ombro. La surdmutulo. Kiu scias, kiel longe jam... Nun li rapide foriris.

La edzino de la astronomo rigardis en la mallumon, poste residiĝis en mola fotelo. Ŝi silente pensis iomete, poste laŭte demandis sin mem: ĝustadire, kial ne...?

Kial ne?

La surdmutulo fariĝis perfekta amanto.

Li ne parolis, ne kverelis pro ĵaluzo kaj ĉiam estis proksime, se ŝi bezonis lin. Se li devis malaperi – li malaperis inter la arbustoj de la ĝardeno. Se la virino dorlotis lin, li komprenis tion kaj ridetis. Li tralegis la librojn ricevitajn de ŝi, ofte vespere ili kune rigardis la televidon el la lito. Se ion li ne komprenis, dufingre li tuŝis ŝian brakon; tio estis lia signo. Tiam ŝi turnis sin al li kaj per klaraj lipmovoj klarigis la nekomprenitajn vortojn. Li dankis per kiso, ĉirkaŭpreno.

La edzo malofte estis hejme. Se tamen, do li sidis inter siaj paperoj, kalkulis, notadis.

Li eĉ ne rimarkis, ke la surdmutulo en la ĝardeno kunbalais je unu amaso la falintajn foliojn de la aŭtuno.

István *Nemere*

Bernard Golden

Lingva Laboratorio

La entreprenema redakcio de *Hungara Vivo* lastatempe reaperigis en la revuo la rubrikon „Literatura Metiejo", kies celo estas kritike prikomenti Esperantajn tradukojn de hungaraj literaturaj verkoj. Kvankam la metieja pritrakto iom tuŝas la lingvouzon, ĝia primara celo ne estas okupiĝi pri sintaksaj kaj semantikaj problemoj. Pro tio mi proponas novan rubrikon kun la titolo „Lingva Laboratorio". Kiu atente tralegas ĉiun numeron de Hungara Vivo, ne povas ne rimarki ekzemplojn de nenorma lingvouzo en la formo de pekoj kontraŭ la gramatiko, misa vortuzo, enŝteliĝo de hungarismoj, malfidelaj tradukoj kaj stilaj nebulaĵoj. Cetere, oni ne prisilentu la tekstomakulantajn preserarojn.

Ĉifoje ni metu en la vort- kaj frazretortojn materialon ĉerpitan el *Hungara Vivo* 1/1983. Ne estas eble pro spac-limigoj pritrakti ĉiujn ĝustigendaĵojn, do ni ekzamenu kelkajn elektitajn temojn, kiuj ofte estigas problemojn por uzantoj de la Internacia Lingvo. La ciferoj sekvantaj ĉiun citaĵon indikas la paĝon kaj kolumnon, kie ĝi troviĝas.

1. La difina artikolo

Kvankam neuzo de la difina artikolo en Esperanto estas karakteriza trajto de slavlingvuloj, la misaĵo troviĝas ankaŭ en verkoj de parolantoj de la hungara lingvo, kiu ja posedas tiun gramatikaĵon.

a. *„La hungaraj sindikatoj jam de la komenco helpis Esperanto-movadon..." (2:3)*

b. *„Post mezo de la 19a jarcento la akcela industriigo transformis la pejzaĝojn de Eŭropo." (5:3)*

c. *„Dume panjo kaj arĝentharara sinjorino mallaŭte konversaciis." (33:1)*

En ĉiu kunteksto temas pri klare difinita organizaĵo, tempo kaj persono: ne iu Esperanto-movado, sed la priparolata Esperanto-movado; ne unu el pluraj mezoj de la 19a jarcento, sed la sola mezo; ne ankoraŭ nekonata arĝentharara sinjorino, sed tiu sinjorino jam menciita en la novelo.

2. Transitiveco de verboj

Estas nekredeble, kiom ofte esperantistoj stumblas pro nescio pri la transitiveco de bazaj verboj, do ili superflue aldonas la sufikson „-ig" aŭ „-iĝ".

a. *„... sed la mondaj informcentroj preskaŭ ne mencias la ĉiutagajn hontiĝojn, suferojn pro la manko de la peranta lingvo..." (17:1)*

b. *„La intervenon urĝigis inter aliaj la kreskantaj bezonoj de ripozado kaj sportado." (24:2)*

c. *„... se mi ekkrius forte mia voĉo longe eĥus kiel en barelo." (33:2)*

La verbo „honti" en Esperanto estas netransitiva; oni ne diras „hontiĝi"; sekve de tio, la substantivo estas „honto", same kiel la verbo „senti" havas la substantivon „sento". Male, en (b) „urĝi" estas transitiva verbo, do ne estas bezonata la superflua „-ig". Ankaŭ „eĥi" en la tria frazo estas transitiva, signifanta resendi sonon, sed en la kunteksto la voĉo mem estas eĥe resendata, do estas bezonata netransitiva verbformo, „eĥiĝus".

3. La adverba participo

Kvankam oni ne ofte menĉias ĝin, parolante pri malfacilaĵoj de la gramatiko de Esperanto, la adverba participo estas daŭre misuzata, malgraŭ tio, ke la regulo estas simpla: ĝi rilatas nur al la subjekto de la finitiva verbo en ĉef- kaj subpropozicio, kaj ĝi priskribas, kiel tiu subjekto agas aŭ statas.

a. *„Dum la aŭtuna migrado eĉ la sekan stepon kovras multloke postpluvaj akvotavoloj, kiuj prezentas al egaj amasoj da birdoj abundan nutraĵon, altirante ilin ripozi." (7:1-2)*

b. *„La komplikajn lingvajn malfacilaĵojn de la internacia komunikado eblos solvi nur akceptante la proponojn de la internacia Esperanto-movado." (3:3)*

c. *„Ne komprenante la skribon, la knabo estis eskortita al komandanto." (36:2)*

En la unua frazo, la adverba participo „altirante" ne povas rilati al la subjekto de la subpropozicio, „kiuj", t.e. „akvotavoloj". Ne la akvotavoloj (sed la abunda nutraĵo en ili) altiras la birdojn, do oni devas diri: „abundan nutraĵon, altirantan ilin ripozi." En frazo (b) oni vane serĉos la subjekton de „akceptante". Kiu, akceptante la proponojn, povos solvi la lingvajn malfacilaĵojn? Oni devas reverki la frazon, por ke ĝi komenciĝu jene: „Nur se oni akceptas la proponojn... eblos solvi la malfacilaĵojn..." Lama estas ankaŭ frazo (c). Temas pri turkaj policistoj, kiuj eskortas knabon al sia komandanto, ĉar tiu portas leteron, kiun la policistoj ne kapablas legi. En la fuŝe verkita frazo, ŝajnas, ke la knabo ne komprenas la skribon. Se oni volas uzi adverban participon en la frazo, ĝi devas havi kiel subjekton la turkajn policistojn: „Ili, ne komprenante la skribon, eskortis la knabon al la komandanto."

4. Vortordo kaj stilo

Pro sklaveca imito de la originala hungarlingva teksto, tradukantoj ofte surpaperigas kriple konstruitajn frazojn kun vortordo fremda al la internacia Esperanto. La sekva citaĵo postulas plurfojan relegadon por kompreni la enhavon.

„La formiĝintaj kadroj, naciaj kaj internaciaj strukturoj apenaŭ kapablas harmoniigi la teoriajn kaj praktikajn metodojn, mekanikiĝintajn, foruzitajn, rustiĝintajn mekanismojn kun la informfluo, kun novajn principojn ins-

pirantaj, novajn modelojn postulantaj tendencoj de nia epoko." (16:1)

La analizo de tiu 33-vorta frazaĉo estas tre komplika. La subjekto konsistas el du substantivoj modifitaj per unu respektive du adjektivoj. La objekto de la infinitivo „harmoniigi" konsistas el du substantivoj kun du kaj tri adjektivoj respektive. Poste sekvas du adjektoj, unu el kiuj estas simpla prepozitivo; la dua estas kuntirita frazo enhavanta substantivan subjekton modifitan per du participoj, ĉiu kun la propra substantiva objekto kun adjektivo. Pezigas la frazon ankaŭ la rozario de dek unu preskaŭ sinsekvaj akuzativigitaj vortoj. Kiu dubas pri tio, voĉlegu ĝin. La Lingva Laboratorio proponas al legantoj cerbtiklan taskon: provu reverki la cititan frazon, por ke ĝi estu legebla kaj komprenebla.

5. Uzo de fremdaj vortoj

Ĉu povas esti, ke ekzistas etnolingvaj vortoj kaj esprimoj, kiuj ne estas tradukeblaj en la zamenhofan lingvon? Ĉu mencio de tiu temo estas herezo aŭ realeca maniero montri la limigojn de tradukebleco, eĉ se temas pri la Internacia Lingvo? Jen ekzemplo.

„Ĝi kapablas plenumi ĉian postulon, kiun oni starigas por hotelo – kaj tute ne multekoste. Naĝejo, ŝaŭno, solarium, pizzeria, butikoj, bowling-restoracio – ĉio ĉi eble efikas kiel io ordinara... Dumtage Vi povas ĝui „Windsurf" aŭ sunumadon..." (18:2)

Kiu faris tiun hibridan tradukaĵon kun miksaĵo de latina, itala kaj anglaj elementoj? Ĉu ne eblas eble esprimi en Esperanto *solarium, pizzeria, bowling* kaj *windsurf?* La Lingva Laboratorio atendas reagojn kaj proponojn de legantoj de *Hungara Vivo.*

Rimarkoj de la Redaktoro

La propono de s-ro Golden pri „Lingva Laboratorio" certe estas bonvena, ja ĝi havos evidentan utilon tiel por la legantoj, kiel por la kontribuantoj kaj redakcio de HV. Estas bonvenaj ankaŭ liaj konkretaj kritikoj, tamen, en kelkaj punktoj ni ne povas ne aldoni niajn proprajn rimarkojn, invitante ankaŭ la legantaron esprimi sian opinion pri la diskutataj problemoj.

1/a: En tiu ĉi kunteksto *Esperanto-movado* estas ne iu priparolita Esperanto-movado, sed Esperanto-movado *ĝenerale;* la uzon de artikolo malnecesigas krom tiu ĝeneraleco de la senco ankaŭ fakto, ke la koncepto portas plurajn trajtojn de propraj nomoj. Tamen ni koncedas, ke en similaj kazoj la lingva konvencio preferas uzi artikolon.

2/a: La verbo „sidi" estas samtiel netransitiva, kiel „honti", tamen oni diras „sidiĝi" (PIV, p. 413). „Hontiĝo" signifas „transiron al nova stato esprimata de la radiko", resp. al la stato de honto.

3/a: Tie ĉi temas ne pri lingva diskuto, sed ornitologia. El la alto la birdoj rimarkas nur la *akvotavolojn,* kaj ne la nutraĵon (vermojn) en ili; la birdoj *scias,* ke en la akvo troviĝas nutraĵoj, tamen ilin allogas la akvotavoloj.

3/b: S-ro Golden esence pravas, tamen en la jena kazo la diferenco inter la ne ekzistanta subjekto de la senpersona verbo „eblos" kaj la ĝenerala subjekto „oni" estas nur teoria.

5: *Pizzeria, solarium, bowling, windsurf* – tiujn ĉi netradukitajn fremdajn vortojn kulpis la Redaktoro. Verŝajne, kun sufiĉa sagaco oni povus trovi Esperantajn ekvivalentojn por tiuj ĉi vortoj, sed ĉu ni vere *bezonas* tiajn ekvivalentojn? Ja ne estas hazarde, ke ĝis nun tiuj ekvivalentoj ne naskiĝis. Krome, ĉi tie temas pri reklamteksto: la mendinto (kaj paginto) de la reklamo volonte revidas la vortojn, kiujn li kredas internaciaj (kaj vere ili estas pli-malpli tiaj, enhavantaj ian aromon de loka koloro), dum se mi kreas iun Esperantan ekvivalenton ne evidentan por ĉiu esperantisto, la mendinto de la reklamo trovos ĉe eventuala kontrolo per hazarde renkontita esperantisto, ke Esperanto simple ne taŭgas por reklamoj. Kaj tio havus katastrofajn sekvojn por nia buĝeto.

Fakterminoj

La suba simpla teksto servas sole por igi klara la sencon de la fakesprimoj, kaj eviti la foje pezajn difinojn.

KOMERCO

Kiel eldonejo de E-libroj ni ankaŭ reklamas, varbas *perantojn* kaj *re-vendantojn.* Ili ricevas *prezredukton,* konsentitan *rabaton.* Kiam alvenas mendo, ni skribas *liverslipon* por liver/ig/i la specifitajn varojn el la *varo-tenejo (staplo, magazeno)* al la mendinto. Poste ni *fakturas* – faras *fakturon* pri la liveritaj libroj, en kiu ni indikas ankaŭ la rabaton. Nia *librotenisto* la finan sumon registras en la *debetan* (maldekstran) flankon de la *persona konto,* kiun ni malfermis por la aĉetinto. La librotenado uzas ja *du-traktadan sistemon* de kontoj. Per sumoj de la sekvaj liveraĵoj ni simile *debetas* la konton de tiu *ŝuldanto,* tiel kreskas nia *bonhavo* ĉe li: do ni iĝis lia *kreditoro.* Se li resendas kelkajn librojn, ni devos *krediti* lian konton, t.e. enskribi en la *kreditan flankon* (dekstran). Foje ni *saldas,* kaj rimarkas, ke la debeta flanko superas la kreditan: estiĝis *debeta saldo.*

Tiun ŝuldon la *kontulo* perletere agnoskis, kaj avizis sian *bank-asignon* por *reguligi* ĝin. La banko kontinue registras en nian *kurantan konton* la alvenintajn (kreditajn) sumojn kaj la elpagitajn (debetajn). Ankaŭ pri la *transpago* ni ricevis konfirmon (*kont-eltiron*) de la banko; la ŝuldo do *estingiĝis,* lia konto montras *nulan saldon.* Jarfine la banko kalkulas la *renton* – laŭ la norma *interezo* (procento) – de nia kuranta konto; feliĉe la banko ne devis nin *financi* per *kurtatempaj kreditoj.*

Por nia presejo ni importis *duonproduktojn,* ankaŭ *daŭremajn produktojn,* kiuj estas *doganendaj* baze de la enlanda *prezonivelo.* La kestoj estis *doganliberaj,* samkiel la vino en doganlibera butiko de la flughavenoj. Pro la *produktaj investaĵoj* nia firmo akiris profiton, kun bona *rentivo (rentabilitato);* tial oni disdonis *rekompencojn* kaj *premiojn* inter la presistoj.

Eluzitan aparaton ni *deprezis* (ĝia valoro jam preskaŭ *amortiziĝis*), anstataŭe ni instalos novan. Por la jarfina *inventaro* oni detale listigas la etaton de la unuopaj varospecoj; la sumo de iliaj valoroj prezentas la *stokvaloron.* Tiu ĉi kaj la ceteraj *inventaraĵoj* plej grave konsistigas la *aktivojn* de la *bilanco.* Ni zorgas konservi *likvidaĵojn (kontantan monon* en la kaso, kreditan bankkonton) por ebligi tujan pagon de kostoj, ekz. imposto, asekuro, transportprezo *(frajto). Akcioj* kaj aliaj *valorpaperoj – biloj* – eventuale alportas *dividendon;* en kapitalismaj landoj oni vendas kaj aĉetas ilin en *biloborso,* ofte kun spekula celo. Ties *makleristo* ricevas honorarie *kurtaĝon.*

Nutraĵbazaro aŭ *legombazaro* estas komercaj kunvenoj kun multaj *vendobudoj,* ofte en haloj. *Foiro* de brutoj, agrikulturaĵoj aŭ de *specimenoj* okazas en fiksita tempo. *Merkato* de iu artiklo ne signifas certan placon, sed rilatas al ĝiaj postulo kaj oferto en la lando. *Superbazaro* kaj *pulbazaro* (de uzitaj objektoj) prezentas egan kontraston de kurantaj fikssprezaj varoj kaj de malnovaĵoj, kies valorojn taksas la aĉetantoj dum *marĉando.*

Ervin *Fenyvesi*

GAJA PAĜO

Forflugas la jaroj

Ĵurnalisto demandas la jubileulon: – La pasinta duonjarcento certe vekas en vi iun agrablan rememoron, sinjoro? !
– Nature! Komence la damoj estis al mi ege ĝentilaj, eĉ ili kutime invitis min: «Bela knabeto, sidiĝu en mian sinon!»

Povas do okazi tiel

– Gratulon, amiko! Hieraŭ mi vidis vin en la kafejo, ho, kiel ĉarmega estas via filino!
– Nu, jes... Tamen bonvolu ne menCii tion al mia edzino...

Ankaŭ la mondo maljuniĝas ?

La kursgvidanto amuze instruas pri veturo: Samideanoj, mia avino veturis iam sur ĉevalo – kaj ŝi timis aŭton. Mia patrino veturis jam en aŭto – kaj ŝi timis aviadilon. Sed mi veturas ankaŭ per aviadilo – kaj mi timas ĉevalon. Ĉu eble mia filino timos per aŭto veturi en la kreskonta trafiko?

Malfeliĉa aŭtisto

– Min frapis hodiaŭ kompleta malbonŝanco! Lama maljunulino paŝ-paŝe transversis la straton, antaŭ mia aŭto ĝuste kiam mi krucis la bulvardon malgraŭ la ruĝa signalo. Kaj kulmine tuj nigre vestita ulo alfrontis min – diable, li finis tiun misan serion kiel policano...

Vera maliculo

– Atentu, sinjoro, mi kunportis taŭgajn informojn *por maltrankviligi lin!*

Singarda promenanto

– Pardonon, sinjoro, ĉu via hundo eble mordas?
– Tute ne, vi povas trankvile enveni en la domon.
– Dankon... prefere iunokte, kiam vi ne estos hejme...

En memserva restoracio

– Mi ne revenos alifoje, amiko, en tiun restoracion!
– Sed kial ne?
– Ĉar mi ne estas kontenta, mi povus pli ĝentile servi min, ol mi nun faris.

Kaj en la malmemserva

– Kelnero! Jam la dekaŋ fojon mi petis kotleton, sed nenion mi ricevis!
– Pardonu, estimata sinjoro, sed por dek porcioj oni bezonas en la kuirejo iom da tempo...

Humanismo antaŭen!

– Kiel mi povos, je la diablo, diri al la kelnero sufiĉe afable, delikate kaj takte, eĉ per varmaj, humanaj vortoj... ke li trompis min?

... Ankaŭ en hospitalo!

– Kio okazis pri mi? – ĝemas viro, post operacio sobriĝante.
– Via aŭto suferis akcidenton, kaj ni operaciis vin.
– Do mi estas en hospitalo?
– Jes, plejparte...

... eĉ telegrame

NI ELKORE GRATULAS PRO VIA NEOKAZINTA GEEDZIGHO STOP MALNUPTA DONACO SEKVOS STOP FELICHAJ BOGEPATROJ STOP

E.F.

●

István Nagy

Revado

La du musidoj kaj la patrino
Kune promenas post la tagfino.
En la ĝardeno estas mallumo,
Nur surĉiele brilas la luno.
Sed jen subite io susuras,
Ĝi la etulojn ege teruras.
Flugas vesperto en la aero,
Ili kaŝiĝas de la danĝero.
„Muso fluganta" – diras patrino,
„Kaŭzon ne havas via ektimo."
Tiam ekvoĉas ido pli aĝa,
Kiu nun estas jam pli kuraĝa;
„Flugi aere estas nun modo,
Ankaŭ mi estos iam piloto."

Linaĵoj por la tuta mondo

La Fabriko de Linŝpinado kaj Linteksado, konata per la markonomo BUDA-FLAX, unuigas en si la tutan hungaran linindustrion.

Ĝi okupiĝas pri produktigo, disfibrado, ŝpinado, teksado de lino, kaj eĉ pri ĝia tajlado por certaj artikloj (ekz. tendoj). La uzinoj, ŝpinejoj kaj teksejoj de la granda entrepreno (kun 5000 laboristoj) troviĝas en pluraj departementoj de Hungario.

Linfabrikoj en: Drávaszabolcs, Fenékpuszta, Kapuvár, Komárom, Mikosdpuszta, Szombathely.

Ŝpinfabrikoj en: Budapest, Komárom.

Teksfabrikoj en: Csillaghegy, Budakalász, Győr, Komárom.

Fabriko de kampadejaj artikloj en: Tab.

La uzinoj estas ekipitaj per la plej modernaj maŝinoj, kaj la modernigado ne haltas, ĉiam oni enkondukas novajn kaj novajn teknologiojn (ekz. tiun de kotonizita lino).

Ekde la 1-a de januaro 1982 BUDA-FLAX ricevis memstaran eksportrajton, kio signifas, ke ĝi rajtas eksporti sen la perado de firmaoj pri ekstera komerco. La eksportrajto validas por propre produktitaj fadenoj, semgrajnoj, kaj BUDA-FLAX ankaŭ havas la rajton importi teksindustriajn materialojn necesajn por la propra produktado.

La eksporta-importa aktivado realiĝas per la Eksporta-importa Oficejo de la Fabriko. Ĝia adreso estas:
Budapest XI. Karolina u.17. Hungario.

La produktojn de la Fabriko oni aĉetas en 33 landoj de ĉiuj kontinentoj.

Niaj plej gravaj merkatoj: Italio, Svedio, Japanio, Usono, Aŭstralio ktp.

Nia eksporta-importa agado realiĝas plejparte pere de agentejoj.

Niaj plej gravaj agentejoj:

Aŭstralio:	Mc Robert and Oakley Pty. Ltd. POB. 143 Balaclava Vic 3183
Belgio:	NEHO Belgium Bld. Paepsem 11/E-b8 1070 Bruxelles
Kanado:	Hungarotex-Canada Ltd. 5000 Buchan st Suite 600 Montreal 308, Quebec
Danio:	Poul Hallas Textilagentur Prins Valdemarsvej 8 DK 2820 Gentofte
Francio:	Goldsoie S.A. 8 Rue de Choiseul 75002 Paris
Finlando:	Tapani Tikanoja Oy Kiskontie 5 00280 Helsinki 28
FRG:	TAGO Textile Aussenhandelsges mbH Gutbrodstr 101 7000 Stuttgart 1
Grekio:	Emile Ch Bonissel 18 Rue Romvis 125 Athens
Italio:	Hungarotex-Italiana Srl. Via Andrea Verga 4 20144 Milan
Irlando:	D.E. Mc Carthy and Son 14. South William Street and Castie Market Dublin 2.
Kuwait:	Hungaro/Kuwait Trading Co.Ltd. Souk Wajif Aloqayan Building 2nd Floor, Kuwait
Norvegio:	NEHO B.V. Alfred Nobellaan 441 3730 AB De Bild
Nov-Zelando:	Harrison and Crosfield /NZ/ Ltd. Wrights Bd. Fort Street St. Auckland C.1.POB. 3326
Svedio:	Bo.L. Scheja AB Runstensplan Norra Angby Stockholm
Svisio:	F.Binz und Söhne AG. Postfach 927 CH 8065 Zürich
Hispanio:	Hungarotex-Espanola Deu y Mata 104 Barcelona 14
Usono:	Hungarotex/USA Inc. 1040 Avenue of the Americas New-York N.Y. 10018
Britio:	T.H. Faulkner and Co. Europe Ltd. 66-68 Margaret Street London W1N 7 FL

Niaj produktaĵoj:

Artiklo	*Sfero de aplikado*
linstupo	ŝpinado, paperindustrio
linfadeno	teksado, tapiŝfabrikado
linfadeneto	ŝufabrikado, leda konfekcio, kaj cetera industria aplikado
lino kaj lintipaj teksaĵoj	vira, virina kaj infana konfekcio, dommastrumaj teksaĵoj, fabrikado de ŝuoj kaj sakoj
kotonaj kaj kotontipaj teksaĵoj	vestaĵoj por libera tempo kaj sporto
subŝtofaĵoj	konfekcio, ŝuproduktado ktp.
teknikaj tekstilaĵoj	filtriloj por likvaĵoj kaj gasoj, geotekstilaĵoj ktp.
tuboj	fajrobrigadaj tuboj, agrikultura irigacio
tendoj	por kampado, konservado, sportaj kaj armeaj celoj
veltoloj kaj Windsurftoloj	velboatado, Windsurf
lingrajnoj	semado, birdnutraĵo

Geotermika energio en Nov-Zelando

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo – Jozefo Major – estas hungaro, vivanta en Nov-Zelando. Li naskiĝis en la jaro 1904 en la hungara urbeto Cece; lernis Esperanton en Budapeŝto en 1919. Li studis en Sorbonne *(Parizo), poste veturis al Japanio, kie li fariĝis redaktoro de „Oomoto Internacia"; la fina stacio de liaj vojaĝoj estis Nov-Zelando, kie li vivas ĝis nun.*

Nov-Zelando estas fora lando, tamen Hungario havas ĉiam pli ampleksajn kontaktojn kun ĝi, bone ilustras tiujn kontaktojn la ĉi-maja vizito de la Nov-Zelanda ĉefministro Muldoon *al Hungario.*

Vulkanoj, gejseroj kaj varmaj fontoj atestas, ke la kerno de la Tero konsistas el varmega lafo. Kie la terkrusto estas relative maldika, tiu ĉi varmo povas esti uzata por la produkto de elektra kurento. La unua tia centralo estis konstruita en *Lardarello* (Italio) en 1913, kie la termika energio aperas en formo de seka vaporo. La dua tiaspeca centralo estis konstruita en *Wairakei,* en la mezo de la nordinsulo de Nov-Zelando. La termika energio tie aperas ankaŭ en formo de vaporo, kiu tamen estas malseka kaj tiel prezentas specialan problemon. La plej nova tia centralo ĵus finkonstruiĝis kun Nov-Zelanda helpo ĉe *Ĝakarto* en Indonezio. Tio montras, ke la antipoda Nov-Zelando estas pioniro en tiu ĉi kampo. Eble Nov-Zelando povos iam doni helpon al aliaj landoj, kie ekzistas regiono favora por la utiligo de geotermika energio. Unu el tiaj landoj estas Hungario, kie sub la Granda Ebeno kuŝas maro da varmega akvo.

En 1930, kiam mi unue alvenis al Nov-Zelando, la indiĝenaj Maorioj jam uzis varmegajn ŝtonojn por kuiri viandon kaj legomojn, ili ankaŭ boligis fiŝaĵon en korboj mergitaj en gejserojn. En *Rotorua,* la turisma centro de la nordinsulo, oni povis kapti fiŝon en malvarmega rivero aŭ lago, treni la ŝnuron al proksima loko kie troviĝis varmega fonto, kaj tie boligi ĝin por agrabla pikniko. Tio donis la ideon al la anglaj kolonianoj, ke la varmega akvo ankaŭ taŭgos por hejtado dum vintro. En Rotorua jam troviĝis bela vaporbanejo, kaj mi baniĝis eĉ en privata domo, kiu ricevis la varman akvon el fonto en la ĝardeno. Post la dua mondmilito, kiam la kosto de energio komencis altiĝi, la teknikistoj ekhavis la ideon produkti elektron el la geotermika energio.

Wairakei troviĝas sur aktiva vulkana zono ĉ. 250 km longa kaj 50 km larĝa. La centralo konstruiĝis sur bordo de rivero *Waikato,* 10 km de la urbeto *Taŭpo.* Ĝi uzas vaporon el putoj boritaj en la apuda Waiora valo. Ĉirkaŭ 60 tiaj putoj sinkiĝas pli ol 600 metrojn, kelkaj eĉ atingas la profundon de 1500 m. La sistemo baziĝas sur granda natura kavaĵo, hejtita de varmegaj kaj parte fanditaj rokoj. La vaporo estas produktita per borado, por redukti la altan premon de la superhejtita akvo. Simple dirite, la bolanta miksaĵo de akvo kaj vaporo eskapas al la surfaco, kie la vaporo liberiĝas disde la akvo, kaj estas kondukata per tuboj al la turbinoj de la centralo. La varma akvo fluas al silentigiloj, kie la premo reduktiĝas al tiu de la atmosfero. Tiu ĉi procedo kreas imponajn masojn da vaporo kaj tondran bruon, kiuj karakterizas la tutan vastan kampon vidatan de aŭtomobilistoj veturantaj sur la ĉefa vojo. Apude ekzistas malgranda muzeo, kie modeloj klarigas la instalaĵojn. Oni povas viziti ankaŭ la centralon, kie la deĵorantoj ĉion klarigas kaj montras la turbinojn.

La planado kaj starigo de la geotermika elektra centralo estas la rezulto de multjara baza laboro de la Nov-Zelanda Ministerio de Scienca kaj Teknika Esplorado. En ties centro mi laboris dum multaj jaroj kiel ĉefa konsilisto sub s-ro P. Studd, angla inĝeniero, kiu gvidis la praktikan laboron en Wairakei. Komencita en 1958, la konstruo de la unua geotermika centralo finiĝis en 1963, kiam ĝi bone ekfunkciis. La centralo estis pligrandigita dum la sekvaj jaroj ĝis la ekonomia maksimumo, post kiu la premo jam malgrandiĝus. La silentigiloj kaj sekigiloj estas Nov-Zelandaj inventoj. La nuna duobla centralo havas kapaciton de 102, respektive 90 MW (mega-vattoj), kaj ĝi kontribuas 1100 GW (giga-vattojn) al la nacia distribua reto, t.e. ĉ. 10 procentoj de la elektra energio bezonata en la nordinsulo. En la reto de la nordinsulo kuniĝas la elektro produktita de la geotermika centralo kaj de serio de hidroelektraj centraloj. Al ĝi oni nun enŝaltis ankaŭ la kurenton de granda ĵus kompletigita centralo, bazita sur surfac-karbo; tiu ĉi liveras la kvaronon de la tuta elektro produktita en ambaŭ insuloj. Kiam eĉ tio ne sufiĉas, oni aldonas elektron el la forta sudinsula reto, kiu alvenas per submaraj kabloj.

Oni pensus, ke Nov-Zelando estas nun riĉe dotita de elektra energio. Tamen tio ne estas vera, malgraŭ la trovo de abundaj naturgaso-fontoj en la nordinsulo. Por zorgi pri la estonta bezono de la ĉiam kreskanta industrio kaj de la elektrigataj fervojoj, oni jam planas *novan geotermikan centralon* en la norda parto de la nordinsulo, kie troviĝas la plej promesplena el inter pluraj eblaj grundoj.

Aliaj energifontoj tutverŝajne utiligotaj dum la venontaj jarcentoj jam estas konsideataj. Ili inkluzivas la energion de vento, suno, oceanaj tajdoj kaj ondoj, kiuj ja estas gigantaj en tiuj izolitaj insulegoj en la suda Pacifiko. Tiuj ĉi fontoj hodiaŭ ŝajnas iom utopiaj, sed ili estos certe utiligataj en la fora estonto apud la nuklea energio. Momente pli promesiga estas la utiligo de „biomaso", ombrela termino por surteraj kaj enakvaj plantoj kaj reziduaj materialoj. Biomaso povas esti la fonto de elektra energio, sed tio jam estas ekster la kadroj de nia temo.

Jozefo Major, M.A.



Zigzage en la kongreslando

Nia enigmo kaŝas plurajn nomojn. Ensendi sufiĉas la solvojn de la linioj **H.**1., 8., 44., 46., 80., 81. kaj **V.**1., 14., 37., 50.

Limdato: unu monato post la alveno de la revuo. Inter la solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: **1.** Protektata stepa tereno, apud la kongresurbo de TEJO **8.** Lago en Transdanubio, populara ripozejo **15.** Plej bona parto (Radiko) **16.** Monument' **17.** Identaj konsonantoj **18.** Perforte forpreni (R) **19.** Abstrakta koncepto (R) **21.** Nefakule, diletante **22.** Interjekcio por peti ripeton **23.** Nedaŭraj, rapide pasantaj **26.** Vintra sportilo (R) **27.** Agu **28.** Malmultvortan, koncizan **30.** Soleca person' **31.** Samspecaj literoj en dato **33.** Naskiĝis **36.** ...do turniĝas **37.** Per lipoj esprimis amon **40.** Avide manĝas **42.** Pri tio oni parolas (R) **44.** Iama ĉefurbo sur la dekstra Danubbordo, fonetike **45.** Suĉinfan' **46.** Urbo sude de Budapeŝto, fonetike (fama pro papriko kaj brodaĵoj) **48.** Iam rusa imperiestro (R) **49.** Frunton **52.** Panoparto (R) **53.** Dolora interjekcio **55.** Longe batalis **58.** Reĝa gvardio! **59.** Vira vest' **61.** Vekhorloĝo faras **64.** Muziksone, inverse **65.** AKE **67.** Urbo proksime al Balatono (neglektu supersignon) en dep. Somogy **69.** Pagilo (R) **70.** Malmola metalo **72.** Konsonantoj de akrobatejo **73.** Granda Hungara ...naĵo **74.** ET **75.** Sporto sur 64 kvadratoj **77.** Eta virin' **78.** Urbo en dep. Komárom **79.** Dumiljara urbo en Suda Hungario (TEJO-kongreso en 1966.), supersignon neglektu **80.** Somera renkonto de E-naturamikoj, proksime de H.79. **81.** Urbo de Somera E-Universitato.

Vertikale: **1.** Fama porcelanfabriko estas en tiu Transdanubia vilaĝo **2.** Skandinavia virnomo **3.** Agresive malobei (R) **4.** Identaj konsonantoj **5.** Rivereto ĉe Tokaj **6.** Orient-Azia konkuranto de H.75. (R) **7.** Fama hungara arkitekto (YBL) **8.** Plendkrias pro doloro **9.** Mirakla solvaĵ' **10.** Tralasi fluidaĵon **11.** Serioza literatura ĝenro (R) **12.** Konsonantoj de „skribema" fluidaĵo **13.** Movu vin internen! **14.** Perlo de Danubo en la ĉefurbo **19.** Mikse demandvorto **20.** Portugala ŝtatviro **22.** „Hungara maro" **24.** Per nenormala forta inklino **25.** Ĉeña virnomo **27.** Adverbo **29.** Malĉeestis (du vortoj) **32.** Post Danubo la plej granda en Hungario, fonetike **34.** Vestaĵ' **35.** Ujo por faruno (R) **37.** Urbo sur la Granda Ebenaĵo, departementa centro **38.** Vojon (inter domoj) **39.** Samspecaj en siropo **41.** Purigilo (R) **43.** Fama vilaĝo de edziĝfestaj dancoj, fonetike **45.** Varmiĝi ĝis vaporiĝo (R) **47.** Purigas en akvo **50.** Industria centro, plej granda urbo post Budapeŝto **51.** Montri intencon de farota malbono (R) **54.** Multaj kongresanoj venos per tiuspeca aviadil' **56.** Inverse: akvita polvo (R) **57.** Urbo en okcidenta Hungario **60.** Transdanubia vilaĝo (kun granda elektra centralo) **62.** Granda ŝtono (R) **63.** Perdu provizore la konscion **65.** Volbe **66.** Inklinus **68.** T... de logaritmoj (R) **70.** Cerbuj' **71.** Infano inverse **75.** Parto de remaĉulo! **76.** Valora metal' **77.** IY

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1983/1:

La homo estas infano, / kaprica kaj groteska:
Kiam li tion komprenos, / li iĝos adoleska. (W. Auld)

Premion gajnis per lotumado: *Gudajmendiev*, K.M., Strelnikovoj, SU-Kirgizio; Zdenek *Hršel*, Brno, CS; *Kotász*, Rita, Budapeŝto, H.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

La aventuroj de Huckleberry Finn
Mark Twain

„La aventuroj de Huckleberry Finn" estas daŭrigo de la fama romano de Mark Twain, „La aventuroj de Tom Sawyer". Tiuj du romanoj estas kaj restas la plej elstaraj kreaĵoj de la Usona porinfana literaturo. Dank' al iliaj bildrakonto-variantoj, nun ankaŭ Esperante oni povos ĝui ilin.

1. Kiu estis la unua viktimo de la rabista bando?
2. Per kio Huckleberry Finn faris truon en la muro de la kabano?
3. Kiel prezentas sin la friponoj David Garrick kaj Edmond Kean?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvo de la demandoj en n-ro 1983/1:

1. Lappar, Tupy, Nodo, Repo rolas en la novelo „Lappar..."
2. „La tabakvendisto" finiĝas per la frazo: „Ĉu indas atendi kio okazos? "
3. „Bonan vojaĝon" estis skribita sur la tranĉilo, per kiu oni murdis la Bolivian ambasadoron. („Lappar, la Antikristo" de Endre Tóth.)

Libropremion gajnis per lotumado: Dieter *Berndt*, Berlin, GDR; W.J. *Usakiewicz*, Varsovio, PL. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

LETERKESTO

Miroslav Malovec, Brno, CS: Via detala letero traktas la ideojn de M. *Gergely* (n-ro 1983/1) pri la atingenda deviga E-instruado. Vi trovas tion ankoraŭ tro frua, tial vi preferas, se esperantistoj unue perfektigas sian lingvoscion. Sendube ŝajnas bona propono: eldonigi por la gravaj fakoj internacian lerno/lego/librojn, en kiuj *nacilingvaj aldonoj* klarigos la fakesprimojn. La praktikecon de tiu ideo – el varba vidpunkto – ni ne povas prijuĝi. Por sportistoj oni jam eldonis tian libreton, okaze de Montreala olimpiko, kvankam verŝajne la landaj E-asocioj ne donis al ĝi sufiĉe da nacilingva, „marĝeno"; la internacia kunlaboro bedaŭrinde ne facile efektiviĝas. Niaopinie inter sciencaj kaj teknikaj fakuloj pli utilas fakaj E-revuoj kaj eldonaĵoj, se temas pri varbado; vidu bonegan ekzemplon de komputistoj! Ni riskas aserti pri demando de unuaeco de fakterminaroj *aŭ* faklibroj, ke ĝi iom similas al tiu: ĉu *ovo aŭ kokino* ekzistis unua? Por disvolvi la faklingvon oni nepre bezonas verki ambaŭ, kvazaŭ samtempe. – Vian leteron ni transdonis al Scienca Eldon-Centro de UEA (Budapeŝto) por konsideri viajn proponojn.

E-Klubo ZPKS, Žerotinovo placo 33, Přerov, CS-75000: Ankoraŭ sufiĉe frue alvenis via informo: 60-jara iĝis via klubo! Akceptu gratulon de nia redakcio! Kaj memkompreneble, ni senpage publikigas *vian inviton* por ĉiulandaj s-anoj al la Jubilea Letervespero je 15a de oktobro (adreso supre), kiam vi komune respondos ĉiujn alvenintajn leterojn.

Korespondi deziras

Prof-ino Kornélia *Godová,* lingvisto, restinta sola kun 14-jara filo serĉas amikinon same solan kun 12-14 j. filo. Korespondo, rec. viz-ito, precipe el Budapeŝto kaj Skandinavio. *Bratislava,* Narcisová 44, CS-82 101. – Studento *Ŝkolnik* Feliks (18) kol. artajn, vojaĝlibrojn, pri H-io, nac. pupojn, dancdiskojn, pk, ankaŭ angle, france. *Vitebsk,* ul. Lokomotivnaja 16-a, kv. 22. SU-210001. – Internacian geamikaron dez. Elzbieta *Strug* (22) studentino. Helpas lerni E, pri pacproblemoj, vivmanieroj kc. *Chorzów,* ul. Jasna 17. PL-41-506. – Interŝ. pm (po 25 div. stampitajn), koresp. pĉt. s-ro Marc *Blondeel* pensiulo, *Lambersart,* 22 rue Cl. Debussy, F-59.130. – Janusz *Szczepanowski* mezlern. instruisto pri kulturo, kutimo de div. landoj, flaŭro, faŭno, sporto, mod-muziko ktp. Interŝ. pm, bk, ka. *Głogów,* ul. Sportowa 12, PL-67-200. – Nijolė *Valčinkienė* (31) infanĝard. edukistino ktm, pĉt, ankaŭ angle, litove, ruse. *Klaipėda,* Taikos pr. 129-99, Litovio, SU-235.819. – Rada *Milnikova* (16) lernantino, ktm, pri lingvoj, liter., filmoj, junulara vivo. *Surgut,* (Tjumen obl.) ul. Energetikov 37, kv. 50. SU-626.400. – Tanja *Savjolova* (16) lernantino, ktm pri liter.,mod.muziko, vojaĝoj, infanoj. *Surgut,* ul. Energetikov 37, kv. 81. SU-626400. – László *Császár* (27) fraŭlo, pri liter., vojaĝoj, naturo ktp. *Svodin* 517, CS-94354. – S-ro *Kowata Kouiči* (22) studento, el Or. Eŭropo, pri stud. vivo, ka. C/o Horimoto, Gion-ĉo Nagacuka 1456-6, Asaminami-ku, *Hirošima,* J-731-01. – Studentino *Yata čieko* (19) pri div. temoj, ktm. 9305-2 Numata-ĉo, Tomo, *Hirošima,* J-731-31. – Studentino *Hirajama haruko* (20), pĉt, ktm, Germanio, 2-1-2 Minamisakae, Ootake-shi, *Hirošima,* J-739-06. – Studentino *Kaŭamura keiko* (19) kun gestudentoj, ktm, pĉt, C/o Nitta-apart. Koive 3-10-32-6, *Hirošima,* J-733. – Studento *Ĵofima masaki* (20) kun junulino, ktm, pĉt. 4-5-6 Higaŝino, *Kumamoto,* J-861-21. – Studento *Jošida masatoŝi* (19) kun junulino, ktm, pĉt, C/o Jošimura, 25-4 Sakuragi-maĉi, *Sendai,* J-982. – Studento *Kano fumihiko* (21) kun estro de E-rondo el tm, pri admin. de E-organoj. C/o Niŝu-hyo 16-3, Yagiyama-midori-ĉo, *Sendai* J-982. – Studentino *Fuĉigami juka* (19) kun 20-jara ino, ktm, pĉt. C/o Miiyake, 207, 2-11-8 Tsukura-ĉo, *Okayama* J-700. – Studentino *Itoo ĉiori* (19) kun gejunuloj 15-25 j. ktm, pĉt. 1-7-8 Oobatake, *Kuraŝiki,* J-711. – Studento *Ooniŝi satoŝi* (20) el Or. Eŭropo, pĉt. 238 Harade, Nabariŝi, Mie, J-518-04. – Inĝ. de veldado *Dimarskij Vladimir* (27) fraŭlo, pri muziko, sporto, fotado, popolmoroj, kol. ins, pm, bk pri urboj, diskoj, etkalendaroj. E-aĵoj. Nepre resp. *Kiev,* u. A. Bučmi 2-90, SU-252.152. – Studento Mieczyslaw *Szydlovski* (20) pĉt kun geamikoj. *Zielona Gora,* ul. Ogrodova 5,4. PL-65-464. – S-ino Helena *Hrudková* (58) pensiulino, precipe pri vojaĝo, turismo, kol. brodaĵoj, belkoloraj vidaĵ-bk kun s-anoj tm. *Sliaĉkupele,* POB 20. CS-962.32. – S-ro Iv. *Šarkun* kun filatelistoj tm, interŝ. pm. koresp. pĉt. *Gorkij* per Motornij 2/5 kv. 12. SU-603.111. – S-ro Jan *Slowinski* (32) kun hungaroj, *Jastrzebie Zdrój,* ul. Marusarzówny 12/16. PL-44-335. – S-ro *Azov* Aleksandr kun Hungario. *Arkadak,* ul. 8 Marta 44. Saratovskaja obl. USSR. – Studento *Itoo akihide* (22) kun samaĝaj junulinoj, ktm, pĉt. C/o Kansaidaigaku Hokutoryo, 25-1 Tukigaoka senriyama, *Oosaka,* J-565. – Studento *Miyoši tsutomu* (21) kun junulino el Svisio k.a. pĉt. 3-3-19 Miyakojima hoondoori, *Oosaka,* J-534. – Studentino *Itami mie* (21) ktm, pĉt. 4-1-301-108 Teraike-dai, Tondabayaŝi, *Oosaka* J-584. – Studento *Maruo hisaŝi* (21) kun gejun. ktm, pĉt. 4-1-21 Noda, Fukuima-ku, *Oosaka,* J-553. – Studentino *Tanaka toyoko* (19) kun junulo el Svisio, Germanio, pĉt. 124 Ŝinči-doori, *Nara* J-639-22. – Studentino Tatjana *Tančuk* kun soc. landoj, pri poezio, libroj, historio, kol. bk de pejzaĝoj, -floroj, libroj, ins. *Taganrog,* ul. Ciolkovskij 30/3, kv. 13. SU-347.916.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Eszter Kiss.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas ĉe ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest **József nádor tér** 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando **KULTURA** (Budapest, P.O.B. 149, H-1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo Szabadság MGTSZ Gyál 83–344
Indexszám: 25 377 ISSN 0018-7704

VIKING CTV 556

La kolortelevidilo CTV 556 reprezentas la plej modernan teknologion, apud ĝiaj pluraj elstaraj ecoj estas aparte menciinda la modul-sistemo, konstruita el duonkonduktaj cirkvitelementoj.



Garantia tempo:	Kiel ĉe ĉiuj ORION kolortelevidiloj– 3 jaroj!
Bildotubo:	56 cm «IN-LINE» de 110°
Konekto de magnetofono:	ĉe impedanco 0,3 V/820 kOhm
Konekto de vidmagnetofono:	Voĉo (efektiva) 1V/1 kOhm
Dimensioj (mm):	690x465x440
Prezo:	24 400,- Ft

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

BÁV

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.

1983 AUG 09